der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

17. Jahrgang Nr. 110 (6/1981) ISSN 001 4-0619 30 Pf

Alvoko de la prezidanto de MEM al ĉiu pacamiko

Ni ne restu senfaraj!

Dum la lastaj jaroj ĉiuj pacamantaj homoj esperis, ke la alproksimiĝo de popoloj, la rezultoj de la pacbatalo kreas la eternan deziron de la tuta homaro: la PACOn!

Bedaŭrinde denove reviviĝis la milita psikozo, la armado kaj la danĝero por la homo vivo kaj por ĉiu kultura kaj teknika rezulto, kiuj igas ŝatata la mondon.

Estas alarme, ke la traktadoj de la malarmadoj stagnas, eĉ la registaro de Usono komencis fabrikadi la neŭtronajn bombojn! Tiu ĉi decido kondukas al la mondkatastrofo kaj estas atenco kontraŭ la homaro!

Ni pacbatalantoj ne povas resti senfaraj. Ni ne konsentas ke unuj ŝtatoj unusole decidu pri la sorto de la homaro!

Mi petas vin bonvolu forte agadi kaj ĉe ĉiu forumo protesti kontraŭ la armado, kontraŭ la fabrikado de neŭtronaj bomboj, kies grandaj elspezoj elprenis la panon el la buŝoj de la malsatantaj homoj.

Estus dezirinde, se ankaŭ multaj esperantistaj societoj, kluboj, MEM-sekcioj kaj unuopaj esperantistoj partoprenus pli aktive en la kampanjo kontraŭ la neŭtronaj bomboj kaj kontraŭ la senutila armado. Mi konvinkiĝas pri tio, ke ankoraŭ certe ekzistas vojo por forigi la mondkatastrofon, se ni pacamantaj homoj efike agadas por tiu nobla celo!

Mi petas vin, bonvolu pri via agado kaj rezulto en tiu ĉi grava afero informi rekte la Mondpackonsilantaron, aŭ vian packomision: propagandcele laŭeble esperante kaj nacilingve; kaj min, ke ni povu komuniki la pensojn kaj farojn de la pacamantaj esperantistoj. Homa devo estas unuigi ĉiun forton kontraŭ la malhumana fabrikado de neŭtronaj bomboj.

Denove mi petas vian kunlaboran helpon por tiu ĉi nobla celo!
Kun sincera estimo, via: D-ro Imre Pethes, Prezidanto de MEM.

„ La internacia junularo kaj la lingva kumunikado“

Pli ol kvincent eŭropaj junularaj kaj studentaj organizoj estis reprezentitaj de la gejunuloj, kiuj fine de oktobro 1980 post jardeko da preparlaboroj — estigis en Budapeŝto la Kadron por Tuteŭropa Junulara kaj Studenta Kunlaboro kaj akceptis ties Fondodokmenton kaj Laborplanon. En tiu ĉi kunlaboro aktive partoprenas Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO).

Dum la konferenco oni faris intervjuojn, petante la gvidantojn de pluraj gravaj junularaj organizoj rakonti pri siaj agadoj, diri sian opinion pri la problemoj de internacia komunikado kaj la eblecoj por TEJO en tiu kampo. Inter ili oni intervjuis

Boris Nikolajeviĉ Pastuĥov, unua sekretario de Lenina Komsomolo de Soveta Unio, kiu sin esprimis jene:

La entuziasmo pri Esperanto kaptas ĉiam pli kaj pli grandajn amasojn de la soveta junularo. Niaj gejunuloj vidas en ĝi interesan, aktivan kanalon, kiu ebligas pli intensan komunikadon kun la junularo de Eŭropo kaj de la tuta mondo. Nia Komsomolo estas unu el la fondintoj de nia Asocio de Esperantistoj kaj ni klopodas kiel eble plej energie enkonduki tiujn praktikajn formojn de laboro, kiuj povus kontentigi tiun ĉi kreskantan interesiĝon, tiun ĉi entuziasmon.

Inter la Hungara Komunisma Junulara Asocio kaj Lenina Komsomolo jam delonge ekzista optimumaj rilatoj de amikeco kaj frata kunlaboro. Ŝajnas al ni, ke ni devas dediĉi atenton ankaŭ al Esperanto, kiu interesas kaj la hungarajn kaj la sovetajn gejunulojn, kiam ni parolas pri novaj ebloj de amika kunlaboro inter junularaj kolektivoj, inter gejunuloj de diversaj urboj kaj regionoj de niaj landoj. Mi pensas, ke ni ankoraŭ havos okazon interparoli kun la kamaradoj, gvidantaj la Hungaran Junularan Asocion, pri la maniéroj pli aktive antaŭenigi tiun ĉi laboron en la praktiko. Kaj mi pensas, ka akirinte la necesajn spertojn, ni povus efike disvastigi ĝin en la frataj socialismaj landoj.

Nun en Budapeŝto okazas eventoj, kiuj ludos eksterordinare gravan rolon en la historio de la demokratia junulara movado. Temas pri tio, ke sukcese finis sian laboron la Konstitucianta Asembleo, tiel estigante la Kadron por Tuteŭropa Junulara kaj Studenta Kunlaboro. Mi esperas, ke en tiuj laborplanoj kaj agadprogramoj, kiujn la reprezentantoj de junulara organizoj pridiskutas ĉi tie, ankaŭ Esperanto, tiu ĉi tre interesa kaj utila agado de gejunuloj, okupos indan lokon.

(EL „Hungara Vio“ 2/1981)

Pri la 66a UK

Ĉi-foje en Sudameriko

La 66a Universala Kongreso de Esperanto okazis ĉi-jare la unuan fojon sur la sudamerika kontinento, de la 25a de julio ĝis la de aŭgusto 1981 en la ĉefurbo de Brazilo, en la arkitekture supermoderna Brazilio. Aliĝis 1749 kongresanoj el 49 landoj, el Afriko 6, Aŭstralio 14, Azio 60, Eŭropo 504, Nord-Ameriko (do Usono kaj Kanado) 77, kaj sole el Sudameriko 1088. La absolute plej granda parto venis el Brazilo mem, nome 932. Esperantistoj el GDR ĉi-jare ne estis reprezentitaj.

La alta protektanto de la kongreso, la Prezidento de Brazilo, malhelpita persone ĉeesti la inaŭguron, estis reprezentita de la vicprezidento Aureliano Chaves. Ankaŭ ĉi-foje la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, Mahta M'Bow sendis salutmesaĝon al la kongreso, subskribitan de la vicĝenerala direktoro Frederico Mayor.

La ĉeftemo de la kongreso estis „Kulturoj kaj lingvoj: pontoj kaj baroj". La inaŭguran paroladon pri tiu temo prezentis la prezidanto de la Akademio de Esperanto, William Auld. La komitato ankaŭ ĉi-jare havis kvorumon kaj povis efike labori. Ĝi akceptis entute 17 rezoluciojn, (evidenta rekordo) t. e. krom la kongresa rezolucio, rezolucion pri handikapuloj kaj dokumentojn, kiuj temis pri ellaboro de nova Ĝenerala Regularo de UEA, Honoraj Membroj, landa agado, statutoj de landaj asocioj, edukado, ekzamenoj, instruado, eksteraj rilatoj, UN kaj UNESKO, centjara jubileo 1887–1987, parlamenta agado, planado, esploro kaj dokumentado, faka agado kaj turismo.

En la kadro de la Kongresa Universitato, kiu definitive transnomiĝis Internacia Kongresa Universitato (ĉar la iama Internacia Somera Universitato dum la brazila vintro ja estas paradoksa) prelegis Paulo Vieira da Silva, Tibor Sekelj, Tosihide Kuwahara, James M. Mabesoone, Otto Haszpra, Ĉen Juan, Francois Lo Jacomo, Heikki Alikosti, Werner Bormann, So Gilsu, Helmar Frank, Alberto Barrocas Behar, Alojzy Wenclewski.
Ankaŭ okazis la 4a Esperantologia Konferenco en trie sesioj, kiuj traktis 1. la lingvon („Evoluo aŭ evoluigo? La lingva estonteco de Esperanto"), 2. la movadon („La idea bazo de la Esperantomovado"), 3. la literaturon („La kontribuo de latinamerikaj Esperanto-aŭtoroj al la Esperanto-literaturo").

Okazis krome artaj vesperoj, ekskursoj kaj multaj fakaj kunvenoj. Entute la kongreso estis siaspece unika, latinamerika, kaj grava atingo en la historio de la Esperanto-movado, ĉar demonstraciis plian fojon la kreskantan ekstereŭropiĝon de la movado. La 67a UK okazos 1982 en la belga ĉefurbo, Antverpeno kaj la 83-a 1983 en Budapeŝto.

37a TEJO-Kongreso en Meksikio

En Oaxtepek, Meksikio, okazis 1981 inter la 10a kaj 17a de julio la 37a Internacia Junulara Kongreso de TEJO. La ĉeftemo estis „Infano kaj Esperanto". Reprezentanto el GDR ne partoprenis.

Renkontiĝo ĉe Moskvo

En majo 1981 en turista bazo Ŝĉerbinka apud Moskvo okazis vica dudek unua regiona renkontiĝo de esperantistoj de centra Rusio, en kiu partoprenis 90 esperantistaj reprezentantoj de Esperanto-kluboj el Moskvo, Leningrado, Ivanovo, Perm, Gorkij, Sevastopol, Voroneĵ kaj aliaj urboj.

Ĉefa celo de la renkontiĝo estis interŝanĝo de spertoj kaj perfektiĝo en Esperanto-konversacio.

Internacia deklamkonkurso

En Hungario, kadre de la Monato de Paco kaj Amikeco dum la 29-30-aj de majo en 1982, inter diversaj programoj okazos internacia deklamkonkurso, far de la Packomisiono de HEA, Departementa Komitato de Hungara Esperanto Asocio je Congrad kaj loka Esperanto Grupo de urbo Szentes / diru: Sentes /. Postulatas poemoj kaj tradukoj nur el la verkoj de Kolomano Kalocsay. Fontmaterialo troviĝas en la ĵus hugareldonita libro, „Tutmonda Sonoro". Sinanonci oni povas en tri kategorioj: infana-, junula- kaj plenaĝa kun du libere elektitaj poemoj, unu nepre pri pactemo.

Inter la tagaj programoj okazos urbovizito, kulturprogramo, muziko / koncerto /, internacia deklamkonkurso, solena pacdemonstracio kaj ceteraj.

Por la aliĝa registro tuj oni anoncu, sed nepre ĝis la monatmezo de aprilo en 1982. Detalojn petu kaj adresu al: „Ifjusági Ház igazgató" Esperanto Demonstracio, H-6600 Szentes.

Das Haus der Ungarischen Kultur teilt mit

Bitte haben Sie Verständnis dafür, daß die Realisierung der Buchbestellungen durch das Ungarische Kulturzentrum nicht so zügig realisiert werden können, wie wir das alle hofften und angenommen hatten. Die ungarischen Kollegen in Berlin geben sich alle Mühe, sind aber völlig abhängig von der Zulieferung aus Budapest. Wir haben ständig Kontakt zum Kulturzentrum und zum Ungarischen Verband und bemühen uns, Wege zu finden, die eine schnellere Belieferung ermöglichen. Um auch **alte, zurückliegende Bestellungen** nun endlich zu realisieren, bitten die ungarischen Kollegen, daß Sie Ihre alten Bestellungen noch einmal aufgeben.

Die Adresse: Haus der Ungarischen Kultur, 1020 Berlin, Karl-Liebknecht-Straße 9

Büro des Zentralvorstandes des Esperanto-Verbandes: Sekretärin gesucht.

Das Büro des Zentralvorstandes des Esperanto-Verbandes stellt ab 1982 eine Sekretärin ein. Aufgaben: Schriftverkehr Deutsch und Esperanto, organisatorische und technische Aufgaben, Finanzfragen, Literaturversand, u. a. Stenografie und Maschinenschreiben erforderlich. Anmeldungen sind zu richten an: Zentralvorstand des Esperanto-Verbandes, 1080 Berlin, Charlottenstraße 60, Tel. 2 20 29 91.

Generala Direktoro de UNESKO al la 66a UK de Esperanto:

Proksimeco de la interesoj

Mi ĝojas novan fojon direkti mesaĝon al la Kongreso de Universala Esperanto-Asocio, kiun mi estis invitita alparoli antaŭ kvar jaroj en Rejkjaviko.

Mi kaptas la okazon por konfirmi la intereson, kiun Unesko havas por la agadoj de UEA, kaj mi nepre konfirmas ĝian grandan kontribuon al la disvolviĝo de internacia komunikado, interkompreniĝo inter la popoloj kaj pere de ili al plifortikigo de la paco en la mondo, kiuj estas la ĉefaj celoj de nia organizaĵo.

Ĉi-jare UEA elektis la temon „Kulturoj kaj lingvoj: pontoj kaj baroj". Tiu temo kunligiĝas kun la ĉefa intereso de Unesko. Nia organizaĵo senĉese batalas kontraŭ la ignoro de aliaj kulturoj — obstaklo al bona kunvivado inter la nacioj — kiu naskas miskomprenojn kaj konfliktojn. Tia agado de nia organizaĵo celas antaŭenigi pliprofundigitan kulturan informadon kaj lingvoinstruadon, ne nur de la lingvoj de la najbaraj landoj, sed de la lingvoj de pli granda disvastiĝo, por malfermi en la lingvaj bariloj trapasejojn, kiuj permesas la disvolviĝon de la komunikado kaj dialogo inter la homoj kaj ampleksigon de la kulturoj en reciproka respekto de individuaj trajtoj.

Ĉi-cele mi bondeziras, ke la kunlaboro inter UEA kaj Unesko daŭru en la plej bonaj kondiĉoj kaj ke la laboroj de tiu Kongreso estu instruriĉaj kaj sukcesplenaj.

anstataŭante Amadou Mahtar M'Bow,
Ĝenerala Direktoro de Unesko,
Federico Mayor,
Anstatataŭa Ĝenerala Direktoro de Unesko

Detlev Blanke

Informado kaj argumentado VIII

(daŭrigo el 4/1981 kaj fino)

4.2. Argumentoj pri la ecoj de la planlingvo

a) „Planlingvo kiel ekzemple Esperanto, estas artefarita (negativa prijuĝo)"

Aliro al la respondo:

1) Aŭ oni akceptas, ke Esperanto estas „artefarita", en la senco, ke ĝia bazo estas konscie kreita. Tiam oni substreku, ke la konscia elemento ankaŭ estas forta en etno-lingvoj, pri kio i. a. atestas la tuta lingvoscienca branĉo de lingvo-planado[43]). Oni povas pruvi la kreskon de „artefaritaj" elementoj en naciaj lingvoj. K. Marx kaj F. Engels en sia komuna verko „La Germana Ideologio" substrekis pligrandiĝantan gravecon de la konscia homa volo je la evoluo de la lingvo: „La natura kreskiteco de lingvo cetere estas nuligita en ĉiu alia plenevoluinta lingvo, parte pro la historio de la lingva evoluo el ekzistinta materialo kiel ĉe la romanaj kaj ĝermanaj lingvoj, parte pro la interkruciĝo kaj intermiksiĝo de nacioj kiel ĉe la angla, parte pro koncentriĝo de dialektoj en nacio, baziĝanta je ekonomia kaj politika koncentriĝo.
Ke la individuoj siavice prenos ankaŭ tiun produkton de sia speco sub sian kontrolon, kompreniĝas per si mem."[44])

2) Aŭ oni entute ne akceptas la „artefaritecon“ de Esperanto kaj montras, ke la lingvo konsistas el elementoj de etnaj lingvoj, do ne estas aribtre elpensita kiel ekzemple la „filozofiaj“ projektoj. Do evidente oni unue difinu, kion oni komprenas sub „artefariteco“.

b) „Esperanto estas morto lingvo (negativa kvalifiko)“
Aliro al la respondo: Ne ekzistas „mortaj“ aŭ „vivantaj“ lingvoj en la strikta senco de la vorto. La atributoj nur estas uzataj metafore sed entenas, subkonscie, fortan dozon da lingvodarvinismo el la pasinta jarcento. „Morta“ kaj „vivanta“ estas nocioj el la biologio. Lingvo estas socia fenomeno. Viva aŭ morta estas la homo kaj ne la lingvo.

c) „Esperanto estas nekohera mikso el diversaj lingvoj“
Aliro al la responda: Miksiteco de lingvo estas io normala. En la leksiko de la germana troviĝas, laŭ fontindikoj en la „Duden“, lingvomaterialo el pli ol 100 lingvoj.
La leksiko de Esperanto konsistas el romanaj radikoj = 70 %, ĝermanaj radikoj = 20 %, alilingvaj radikoj = 10 %.

d) „Esperanto estas malbela lingvo“
Aliro al la respondo: Tiu aserto estas pure subjektiva. En la lingvoscienco ne ekzistas „belaj“ aŭ „malbelaj“ lingvoj.
Por eŭropa nescianto de Esperanto la lingvo ŝajnas iom parenca en la sonkonsisto al la itala lingvo, kiu rangas kiel „bela“.

e) „Pro la nacia influo je Esperanto ĝi certe devos disdialektiĝi“
Aliro al la demando: Nek la praktiko tion konfirmis, nek teorie la rezonado estas ĝusta. Ju pli forta estas aplikita Esperanto despli forte efikas samtempe du sin kontraŭantaj fortoj a) la malunuecigaj fortoj pro la kreskanta premo de naciaj lingvoj je Esperanto, b) la unuecigaj fortoj pro la pli ofta praktika uzado, kiu kondukas al plifirmigo de la normoj. La praktiko ĝis nun montras pli fortan pezon de la unuecigaj faktoroj.
Cetere, akceptante tiun argumenton, neniu nacia lingvo povus funkcii kiel internacia, ĉar ankaŭ ĝi disdialektiĝus.

4.3. Ŝajnargumentoj

Tiuj argumentoj baziĝas precipe je aprioraj supozoj kaj ne tiom je rezonado.
Oni ekzemple asertas:

a) „La lingvo ne povas evolui, ĉar novajn vortojn ĉiam iu instanco devas akcepti kaj decidi“
b) „La lingvo ne taŭgas por esprimi plej subtilajn homajn sentojn“
c) „Ne ekzistas en Esperanto belliteraturaj verkoj, ĉar mankas al la lingvo kultura fono, kiel ĉe etnaj lingvoj“
d) „Mankas scienca literaturo k. t. p.“

Oni tuj vidas, ke la homoj tion asertante simple ne scias la bazajn faktojn. Do oni ne devas multe argumenti sed nur informi, ke la lingvo evoluadas, ke ĝi kapablas esprimi subtilajn sentojn, ke ekzistas belliteraturo, sciencaj verkoj k. t. p. Tion ĉi, finfine, nur povas tiu prijuĝi, kiu konas Esperanton kaj ties aplikosferojn, do la informanto. La diskutpartnero simple devas akcepti la informojn.

5. Finvorte

Sendube la menciitaj argumentoj nur estas kelkaj, kiujn oni ĝenerale renkontas. Restas multaj ne menciitaj.
En la praktiko ili aperas kombinitaj kaj ne nepre en tiu simpla formo.
(Daŭrigo p. 127)

1300 jaroj Bulgario

Sciencpraktika Konferenco

29 — 31 de majo 1981 okazis en Šumen jubilea sciencpraktika esperantista simpozio. Partoprenis ĉirkaŭ 160 personoj el Bulgario, Sovetunio, Pollando, Hungario, Slovaka SR kaj Germana Demokratia Respubliko.

Sciencistoj el arkeologiaj institucioj kaj historiaj muzeoj prezentis vicon da prelegoj en Esperanto pri la miltricentjara historio de Bulgario.

Specialan atenton trovis la arkeologiaj pristudoj en la urbo Pliska, unua ĉefurbo de Bulgario, kaj en la urbo Preslav, dua ĉefurbo de Bulgario.

La konferencanoj aŭskultis prelegon pri la urbo Madara kaj la ĉevalrajdanto de Madara. Tute prave oni nomas la urbon Madara „Bulgara Trojo". Se en la greka Trojo plej grandan intereson prezentas la restaĵoj el la tempo de la Troja Milito, en Madara plej gravaj estas la restaĵoj de la unua Bulgara Reĝlando.

La signifo de tiuj antikvaĵoj estas tia, ke samrange kun la malnovaj ĉefurboj Pliska kaj Preslav hodiaŭ Madara rajte estas konsiderata kiel unu el la sanktaĵoj de la bulgara historio. La roka reliefo de Madara viciĝas inter la unikaj monumentoj de la arto en Eŭropo dum la frua mezepoko.

Interesa estis ankaŭ la prelego de la neŭrologo d-ro Conev pri la bulgara mezepoka medicino, kiu havas siajn fontojn en la traca, prabulgara kaj slava medicinoj.

La bildon pri la 1300-jara bulgara historio kompletigis ekskurso al la fortikaĵo Šumen, kiu apartenas al la atestantoj pri la naskiĝo de la unua bulgara regno en la jaro 681.

Promenante inter la elfositaj restaĵoj de pasintaj homaj kulturoj oni sentas la blovon de plurmiljara homa historio. La ebena montplataĵo de Šumen, kiu dominas okcidente de la urbo, norde, sude kaj oriente estas ĉirkaŭita de pitoreskaj rokoplenaj deklivoj. Per sia fervora geografia kaj strategia situo ĝi altiris la homon ek de la plej profunda pratempo. Trovitaj prahistoriaj materialoj, precipe ceramikaj, atestas, ke jam en la malfrua ŝtonkupra epoko (3500 ĝis 3100 jaroj antaŭ nia erao) ĉi tie loĝis homoj.

Al la programo de la simpozio apartenis ankaŭ vizito al la verŝajne plej granda monumento en Eŭropo, memormonumento „1300 jarojn Bulgario". Starigita sur la plej alta montopinto apud Šumen, ĝi per siaj 7 imponaj figuroj simbolas la forton kaj la potencon de popolo, kiu rezistis sukcese kontraŭ ĉiuj sociaj ŝtormoj kaj sortobatoj. Oni ĝin inaŭguris dum oktobro 1981, kiam okazis la kulmino de la jubileaj festoj.

Ni, la eksterlandaj gastoj de la pasinta konferenco, povas atesti al la organizintoj de la simpozio, ke ili sukcesis prezenti al ni altnivelan simpozion. Ni revenis al niaj landoj kun profundaj novaj ekscioj pri la bulgara historio. La restado en la regiono de Šumen nin plene kontentigis kaj ni estas dankemaj al niaj geamikoj en Šumen pro la granda gastamo montrita al ni.

Eva kaj Rudolf Burmeister

---

kiel prezentitaj.
La studo ne celis kompletecon, sed nur volis doni superrigardon pri kelkaj teoriaj problemoj de la grava kampo de la informado kaj argumentado. Ni klopodis tuŝi kelkajn aspektojn kaj atentigas la leganton je la citita literaturo por plie enprofundiĝi en la temon.

Devus ankoraŭ sekvi ĉapitro pri la *praktiko* de informado. Ni tion ne celis, ĉar la praktikaj eblecoj de bona informado estas multaj kaj forte dependas de la konkretaj cirkonstancoj, al kiuj oni devas adaptiĝi.

Notoj

[43]) Kp. pri tio V. Tauli: Introduction in the theory of language planning, Uppsala 1968

[44]) K. Marx/F. Engels: „Die Deutsche Ideologie",en: Marx-Engels-Werke, Bd. 3, Berlin 1923, p. 448

(Fino)

1300 jaroj Bulgario

El Ŝumen oni skribis al ni:

Karaj amikoj esperantistoj
En la jaro 1981 Popola Respubliko Bulgario celebras la 1300-jariĝon de l'Bulgara Ŝtato.

Ni sentas apartan fieron pri tio, ke ni loĝas en distrikto, sur kies teritorio estis fondita la Unua Bulgara Ŝtato. En la distrikto de Ŝumen troviĝis la unuaj du ĉefurboj de Bulgario:

Pliska kaj Veliki Preslav (La Granda Preslav). Pli ol du jarcentojn Pliska estis la ĉefurbo de la juna bulgara kulturo. Arkeologiaj elfosaĵoj ĉe la palacoj kaj la muroj de fortikaĵoj plej konvinke atestas pri la kulturaj atingoj antaŭ 12 ĝis 13 jarcentoj. Ni, kiel esperantistoj kaj civitanoj de Popola Respubliko Bulgario, konscie donas niajn klopodojn por la disfloro de nia patrolando. Ni bone scias, ke la ekonomiaj kaj sociaj rezultoj estas ŝuldataj al la socialisma konstruado kaj frata kunlaborado kun ĉiuj socialismaj landoj, kaj antaŭ ĉio — kun USSR.

La esperantista movado en nia distrikto havas jam 75-jaran historion. Pro apartaj meritoj, la plej malnova Esperantista Societo „Vekiĝo" estas dekorita per alta ŝtatordeno . . .

Distrikta Estraro de
Bulgara Esperantista Asocio
Ŝumen

Bulgara artvespero en GDR

La geartistoj Belka Beleva (aktorino), Galja Kostova (kantistino), Jeanne Stanĉeva (pianistino) kaj Anani Anev (aktoro) el Bulgario prezentis riĉan programon okaze de la 1300-jara ekzisto de Bulgario kun grandega sukceso la 25an de oktobro 1981 en Dresden. Per deklamoj kaj kantoj en pura kaj artisme bela Esperanto la geaktoroj prezentis perlojn el la bulgara kaj internacia kulturo.

Internacia Esperanto-Kursejo

1090 Sofia, P. K. 791, Str. Kutlovica 25, tel. 43 13 62
Programo 1982

1. Smoljan (Pisanica)

Dusemajnaj kursoj: januaro 3. — 16., 17. — 30.; februaro 1. — 14., 15. — 28., marto 1. — 14., 16. — 29.; majo 3. — 16., 17. — 30.; junio 1. — 14., 16. — 29.; julio 1. — 14., 16. — 29.; septembro 1. — 14., 16. — 29.; oktobro 1. — 14., 16. — 29.; decembro 1. — 14., 15. — 28.

Dudektaga kurso: aŭgusto 11. — 30.

Prezoj en levoj:
Por dusemajnaj: 196 (ĉambro kun 2 litoj), 168 (kun 3 — 4 litoj), 140 (kun 6 — 8 litoj).

Por dektaga: 140 (ĉambro kun 2 litoj), 120 (kun 3 — 4 litoj), 100 (kun 6 — 8 litoj).

Por dudektaga: 280 (ĉambro kun 2 litoj), 240 (kun 3 — 4 litoj), 200 (kun 6 — 8 litoj).

En la programo: kvar lernohoroj potage, vizito al Smoljan kaj planetario, al Pamporovo kaj veturo per lifto al la supro „Sneĵanka", al vilaĝo Mogilica, al la Trigrad-intermonto kaj al la groto „Gorĝo de la diablo", aliaj ekskursoj, sportludoj, diskoteko, diafilmoj, gajaj vesperoj, prelegoj k.a.

Renkonto al la Novjara 1983:

La 29an de decembro 1982 — la 2an de januaro 1983.
Prezoj en levoj: 80 (ĉambro kun 2 litoj), 70 (kun 3 — 4 litoj), 60 (kun 6 — 8 litoj).

En la programo: novjara balo, vizito al Smoljan kaj planetario, al Pamporovo kaj veturo per lifto al la supro „Sneĵanka".

2. Varna (Oraj sabloj)

Dusemajnaj kursoj: majo 3. — 16., 17. ĝis 30.; junio 1. — 14., 16. — 29.; septembro 1. — 14., 16. — 29.; oktobro 1. ĝis 14., 16. — 29.

Prezoj en levoj:

Por majo kaj oktobro 196 (ĉambro kun 2 litoj) kaj 168 (kun 3 litoj); por junio kaj septembro 238 (kun 2 litoj) kaj 210 (kun 3 litoj).

En la programo: tri lernohoroj potage, plaĝo, vizito al Varna, Balĉik, Tolbuhin, aliaj ekskursoj, sportludoj, diskoteko, diafilmoj, gajaj vesperoj, prelegoj k. a.

Kontrakto Frankfurt/Oder — Vraca

La Distriktaj Estraroj de EAKL Frankfurt/O. kaj de Bulgara Esperanto-Asocio Vraca subskribis la 6an de julio 1981 kontrakton pri amikecaj rilatoj kaj kunlaboro. Kiel celojn la kontrakto mencias „profundigi la amikecajn rilatojn inter la niaj ĝemelaj distriktoj de Vraca kaj Frankfurt/O., ebligi al niaj membroj interŝanĝon de informado pri la Esperanto-movadoj en niaj landoj".

Raporto pri IMEK III

Siatempe, 1977 en Krakovo, la kolegaro esperis, sed ne riskis aserti, ke el la sukcesa I-a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco povus eliri tia fortika tradicio. Nun, post la IIIa, estiĝintaj iom fieraj, ni certas, ke IMEK trovis sian daŭran situon en la faka Esperanto-movado.

Cifoje niaj bulgaraj gekolegoj, la Medicina Sekcio de Bulgara Esperantista Asocio, kunlaborante kun Universala Medicina Esperanto-Asocio, gastigis nin de la 15a ĝis 19a de julio 1981 en la ĉarma danuba urbo Ruse. La kreskinta atrakcio al IMEK montriĝas en la plu ampleksiĝinta partoprenantaro: konferencis 220 medicinistoj, farmaciistoj, veterinaroj kaj kolegoj de parencaj profesioj el dek landoj, inter ili 15 el GDR.

Sub la honora prezido de Prof. d-ro Kolju Garkov, vicministro pri popola sano, la IIIa Internacia Medicina Esperanto-Konferenco estis aranĝita omaĝe al la 1300-jara jubileo de la Bulgara Ŝtato.

IMEK, — tio estas en sia kerno plurparta medicintema prelegserio. La nunjaraj ĝeneraltemoj estis 1. prizorgado de la ĉirkaŭa medio kaj 2. Esperanto kaj la progreso de la medicino. Krome oni rajtis referi pri aliaj temoj.

La gekolegoj ĉiam atente sekvis la bonnivelajn kontribuojn de 43 prelegintoj. La prelegoj, plej-grandparte ĝenerale interesaj, vekis viglan diskuton.

La faka kaj lingva kvalito de la prelegoj, prezentitaj far naŭ gekolegoj de Medicina Fakrondo de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR estas ĝojige plialtiĝinta, kaj ni preskaŭ nur aŭskultis bonajn kaj tre bonajn kontribuojn:

Prelegis d-ino Irmgard Bärenz (Senftenberg) pri „Variigoj de spino kaj difektoj de pozicio en la kresko-aĝo“, d-ro Klaus Bochmann (Bräunsdorf) pri „Kelkaj terapiaj refleksmetodoj — permana terapio, akupunkturo, pingla terapio“, d-ro Giso Brosche (Rückersdorf) pri „La bova trihofitozo“, kolegino Wera Dehler (Berlin) pri „Terminologiaj problemoj“, kolegino Jutta Lorenz (Zwickau) pri „La provizado de sterila materialo en subdistrikta malsanulejo de GDR“, SK d-ino Eva Thormann (Schwerin) pri „Stabiligo per jogo“, kolegino Margit Volkmann (Zittau) pri „Radia protekto por paciento kaj personaro en la rentgena diagnostiko“ kaj kolegino Herta Zemlin (Magdeburg) pri „Spertresumo pri la meningeozo-profilaktiko ĉe akuta leŭkemio en infanaĝo“. Inĝ. Karl-Joachim Thormann krome eksplikis pri „La Internacia Lingvo en la establita mondo“.

La kontribuo de Wera Dehler, emfaze kaj belstile prezentita, devas esti pro la tema enhavo konsiderata precipe grava, ĉar la neceso de organizita evoluigo de nia faka terminaro miaopinie ĝenerale ne sufiĉe konsciatas en la esperantistaro-medicinistaro.

Prezidantoj de landaj medicinaj fakrondoj respektive de landaj UMEA-sekcioj kaj landaj reprezentantoj dum la konferenco interkonsiliĝis pri organizaj aferoj.

Plimulto aprobis rekomendon sendotan de IIIa IMEK al Monda Organizo pri Sano (MOS), al la Internacia Ruĝa Kruco kaj al aliaj internaciaj kaj naciaj organizajoj. Estas rekomendite kunlabori kun UMEA, eldoni informilojn de MOS ankaŭ en Esperanto, subteni la iniciatojn por enkonduki Esperanton ĉe diversfakaj medicinaj konferencoj kaj kongresoj, por ke ĝi aperu kiel oficiala lingvo kaj akceli la instruadon de Esperanto al sanitaraj laboruloj kaj medicinaj studentoj.

Akceptita estas propono de Medicina Fakrondo de GDREA estonte okazigi konsultiĝojn inter reprezentantoj de medicinaj fakrondoj respektive landaj sekcioj de UMEA por pliefektivigi gvidajn agadojn, por kunordigi la laboron kaj por akceli la elcentran organizadon de okupiĝo pri la medicina terminologio en Esperanto.

La tradicia vizito al urba hospitalo ankaŭ en Ruse havis altan praktikan valoron por la internacia kolegaro.

Originalan ideon la bulgaraj kolegoj realigis per la eldono de 100-paĝa libro „La medicino dum 1300-jara historio de Bulgario“ kaj ties disponigo al la konferencanoj.

La tre ampleksa ekskursa programo kondukis la medicinistojn en la pasintecon de Bulgario: La Rajdanto de Madara, ŝtona simbolo el la bulgara kultura historio, la ruinoj de la antikva bulgara ĉefurbo Pliska, la Tombul-moskeo en Šumen kaj la unike pitoreska urbo Veliko Tarnovo emocie impresis la ekskursantojn.

La bona organiziteco de la fakkonferenco, la iniciatemo kaj helpemo de la kolegoj de LKK kaj ties sinofera klopodado, la aloga faka kaj kadra programoj kune kun la ĉiama sunvetero kaj ĉies bonhumoro kreis la koran kolegan IMEK-etoson.

La IIIa Internacia Medicina Esperanto-Konferenco fariĝis tre valora gajno por ĉiuj partoprenintaj gekolegoj kaj signifa evento por la faka Esperanto-movado ĝenerale.

La konferencanoj el GDR sincere kaj tre kore dankas siajn bulgarajn gekolegojn.

D-ro Giso Brosche

SAEST '81

Konferenco pri la Aplikado de Esperanto en Scienco kaj Tekniko

La konferenco okazis en la Domo de Sindikatoj de Žilina/ČSSR en 1981/08/14—17. Gi donis al la 173 partoprenantoj el Anglio, Aŭstrio, Bulgario, GDR, FRG, Hungario, Italio, Japanio, Jugoslavio, Pollando, Rumanio kaj USSR optimalajn kondiĉojn. El GDR partoprenis du delegitoj kaj 11 pluaj fakuloj.

Oni okazigis dum tri konferenctagoj 54 prelegojn de prelegintoj el 9 landoj, 3 filmojn kaj grandan podiodiskuton. La nombro de la partoprenintaj esperantistaj komputistoj estis sufiĉe granda, ke ili preskaŭ dum la tuta konferenco kunestis en aparta seminariejo.

La plimulto de la prelegoj el la konferenco (48 prelegoj) estas presitaj (en du volumoj, el tiuj la dua nur temas pri problemoj de komputistoj), kaj oni povas mendi ilin ĉe AESSR.

Kulmino estis la podiodiskuto pri celoj kaj taskoj de ISAE sub la gvido de prof. d-ro Kafka, redaktoro de „Scienca Revuo". Okaze de tiu diskuto, prof. d-ro Haszpra el Hungario parolis pri la multflankaj eblecoj devenantaj el la fondita „Sciencafera Centro" (SAC) en Budapest, kiel filio de UEA, precipe pri ties eblecoj por la eldono de fakliteraturo kaj fakvortaroj.

Precipe impresplena estis la prezento de sonfilmo pri la tujaj kaj malfruaj sekvoj de la faligo de atombomboj al Hiroshima kaj Nagasaki. Tiun filmon kunportis japana amiko.

Grandan intereson prave trovis la lumbildprelego de la soveta inĝeniero A. Kogan pri „Veldado en la kosmo".

La esperantistaj komputistoj interkonsiliĝis pri la nuna kaj estonta kunlaboro. La Scienca Sekcio de HEA disponas pri listo de ĉirkaŭ 700 adresoj de esperantistaj komputistoj. Delegito el GDR informis, ke en aŭtuno 1981 fondiĝos tiaspeca fakgrupo en GDR..

Fine mi volas elstarigi kelkajn gravajn pensojn kaj vidpunktojn, kiujn alportis

SAEST 81:

— Ĉar en nia tempo precipe validas ekonomiaj aspektoj por decidoj en ĉiuj sferoj, estas necese science esplori la kostojn de la multlingveco kaj uzi ilin kiel argumentojn.

— Verŝajne estus pli bone, se la esperantistaj sciencistoj havus **unu** ampleksan, regulan, bonkvalitan, sciencan ĵurnalon, anstataŭ kelkajn maldikajn preskaŭ mortantajn. „Scienca Revuo" povus ludi la rolon de tiu unusola ĵurnalo.

— ISAE ĉefe celas la estiĝon kaj fortigon de multaj diversaj fakorganizaĵoj. Gi ne devas subteni fortajn fakorganizaĵojn.

— La fakorganizaĵoj poste aliĝu al UEA.

— Estus bone, se ĉiu landa Esperanto-Asocio eldonus po jaro unu kajeron, similan al „Sciencaj Komunikaĵoj".

— La Sciencafera Centro en Budapest ju pli bone povas labori, des pli multaj esperantistaj sciencistoj estas pretaj kunlabori per reviziado de fakterminaroj kaj faktekstoj.

— La esperantaj fakterminaroj tro forte postrestas malantaŭ la etnaj faklingvoj. Urĝe necesas la laboro pri terminaroj.

Tre laŭdinde estas, ke la slovakaj esperantistoj organizis turismajn aranĝojn, kiuj okazis samtempe kaj rekte post la konferenco. Pro tio kaj pro la aliaj nomitaj laŭdindaĵoj, la partoprenintoj tre kore dankas al la organizintoj de tiu tre sukcesplena konferenco.

SAEST '82 okazos 13. — 15. 8. 1982 en Ceske Budějovice pri la ĉeftemoj:

1. Faka traduko kaj faka lingvo,
2. Nekutimaj energifontoj kaj ilia apliko.

Ni preparu kaj reciproke reviziu prelegojn pri tiuj temaroj!

Interesuloj pri la konferenco 1982 el GDR nepre kontaktu la prezidanton de la Scienc-teknika Komisiono ĉe GDREA, Richard Partecke, 5900 Eisenach, Am Ofenstein 5.

Pri la konferenco raportis slovakaj gazetoj kiel „Prawda", „Práca" k. a. kaj ankaŭ „Neues Deutschland".

SAEST 82 en Česke Budějovice

La venonta faka seminario SAEST 82 okazos de 13a ĝis 15a de aŭgusto 1982 en la sudbohemia urbo Česke Budějovice/ČSSR. La temo estas „Energio — la tutmonda problemo“ (novaj metodoj de energi-produktado, metodoj de pli efika energiuzado, ŝparmetodoj, konstruado de energetike pli efikaj maŝinoj, rilato de homsano kaj energio, k. t. p.).

La dua parto de SAEST '82 estos dediĉita al problemoj de faka terminologio kaj faka traduko.

Limdato por aliĝoj de ĉiuj partoprenontoj estas la 28a de februaro 1982

La sama limdato validas ankaŭ por akcepto de manuskriptoj de la prezentotaj prelegoj en amplekso de 8 — 10 tajpitaj paĝoj. La aŭtoroj bonvolu peti detalajn instrukciojn. La aliĝojn sendu al kaj la instrukciojn petu de: Čeha Esperanto-Asocio, Jilská 10, 110 00 Praha 1, ČSSR.

Laŭ la instrukcioj pretigitajn manuskriptojn sendu al: Doc. d-ro Vlastimil Novobilský, Školni 5, CS-400 01 Usti n. L. Se vi deziras, ke via prelego aperu en la planata almanako, kiu estos dissendita al ĉiu partoprenonto antaŭ la seminario, bonvolu certigi, ke la adresato ricevu vian manuskripton plej malfrue fine de februaro 1982.

La partoprenontoj loĝos en moderna studenta kolegio kaj kunsidos en novkonstruita kultura domo.

Sciencteknika Komisiono ĉe GDREA fondita

La 3-an de oktobro 1981 fondiĝis en Berlin la Scienc-teknika Komisiono ĉe la centra estraro de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR. Elektiĝis prezidanto Richard Partecke (5900 Eisenach, Am Ofenstein 5). La Komisiono kunordigos kaj gvidos tiajn aktivecojn koncernantajn ĉiujn jam ekzistantan scienc-aplikajn fakgrupojn, t. e. inter alie: gajnado de novaj interesitoj por la scienc-teknika apliko de Esperanto en diversaj sferoj, pretigo de bibliografiaj materialoj, unuecigo de la principoj ĉe ellaborado de fakterminaroj kaj ĉikoncerna kunlaboro internacia, stimuligo kaj kunorganizado de interdisciplinaj fakarangoj, kreadoj de novaj fakgrupoj, publikigo de konvenaj materialoj ktp. La Komisiono eldonas neregulan internan informilon germanan (eble estonte esperantlingvan).

Prelegoj en Teknika Altlernejo

Dum septembro 1981 d-ro Hans-Joachim Hußner prelegis antaŭ sciencistoj de la Teknika Altlernejo Ilmenau pri „La aktuala internacia lingva situacio“ kaj „Esperanto kaj maŝina tradukado“.

Termine 1982, bitte vormerken!

1. **IFER '82, internationales Messe-Treffen der Esperantisten, vom 12. — 14. März 1982 in Leipzig. Anmeldungen an den Bezirksvorstand des Esperanto-Verbandes, Organiza-Komitato IFER, DDR - 7011 Leipzig, Pf. 713, (vgl. „der esperantist“ 3/81, S. 68).**

2. **Intensivkurs, vor allem für Fernstudenten, vom 19. — 24. April 1982 Johanngeorgenstadt. Der Kurs wird von einem ausländischen Lektor geleitet und kostet ca. 100 Mark (zuzüglich der jeweiligen Fahrtkosten).**

3. **SEFT, Sommer-Familientreffen in Feldberg bei Neustrelitz, 9. — 21. August 1982. Informationen bei Werner Pfennig, 2000 Neubrandenburg, Leipnitz-Str. 5/67.**

4. **V. Treffen ehemaliger Arbeiter-Esperantisten, vom 15. — 17. April 1982 in Leipzig. Teilnahme kostenlos.**

5. **III. Esperanto-Ferien (mit Fortbildungskurs) auf dem internationalen Zeltplatz Intercamping-Krossinsee (bei Berlin). Anmeldungen: Bezirksvorstand des Esperanto-Verbandes, 1020 Berlin, Breite Straße 33/35 (vgl. in diesem Heft S. 143).**

6. **16. Seminar für ehrenamtliche Leitungskader des Esperanto-Verbandes, vom 7. — 12. November 1982 in Lychen (bei Neustrelitz). Teilnahme kostenlos.**

7. **IV. Interlinguistik-Seminar, vom 21. bis 23. November 1982 in Ahrenshoop, nur auf persönliche Einladung (für Wissenschaftler).**

8. **9. Jugendseminar (vom 29. November bis 3. Dezember 1982 in Lychen (bei Neustrelitz). Teilnahme kostenlos.**

9. **Jugendintensivkurs vom 9. — 15. 5. 1982 in Seeberg, Bez. Potsdam. Leitung durch einen ausländischen jugendlichen Lektor. Ca. M 100,— zuzüglich Fahrtkosten.**

10. **3. Konferenz der Mediziner-Esperantisten, 26. — 28. 2. 1982. Anmeldungen und Informationen bei: Dr. Giso Brosche, 7981 Rückersdorf.**

11. **5. Touristisches Treffen der Erzgebirgs-Esperantisten (ČSSR/DDR) vom 6. bis 10. 10. 1982 in Schwarzenberg. Ca. M 60,— zuzüglich Fahrtkosten. Informationen bei: Rudolf Eichler, 9430 Schwarzenberg, Hermann-Matern-Straße 21, für Interessenten aus der ČSSR: Jaroslav Klement, Kpt. Nálepky 7, CS-360 04 Karlovy Vary.**

Voranmeldungen für 2, 4, 6, 7, 8 und 9 können ab sofort an den Zentralvorstand des Esperanto-Verbandes im KB der DDR, 1080 Berlin, Charlottenstraße 60, gesandt werden. Einladungen und weitere Informationen werden zu gegebener Zeit an die Interessenten versandt.

La gazetaro pri ni 1980

1. Tutrespublikaj gazetoj

— **„Neues Deutschland“,** Berlin, SED, 15. 7. 80 Esperanto-poŝtaĵoj en 20 landoj; 4. 8. 80 Universala Esperanto-Kongreso en Stokholm (du artikoloj); 8. 9. 80 Esperanto, pri junulara renkontiĝo; 4. 12. 80 Štruvelpetro-libro en Deutsche Staatsbibliothek; 11. 8. 80 Esperanto-Kongreso en Stokholm; 22./23. 11. 80 Pli multaj partoprenantoj en Esperanto-rondoj; 11./12. 10. 80 Konferenco de „Paca Konsilantaro“ de GDR, mencio pri Esperanto
— **„Wochenpost“,** Berlin, 39/80 Pro kaj kontraŭ; 42/80 La lingvo internacia; 1/80 Lingva ponto; 29. 9. 80 Debato pri lingva bariero (pri UK Stokholm)
— **„Bauernecho“,** Berlin, Kamparana Partio (DBD), 11. 8. 80 Monda Kongreso sen interpretistoj (pri UK Stokholm)
— **„Der Morgen“,** Berlin, LDPD, 21. 7. 80 Esperantistoj; 5. 8. 80 UK sen interpretistoj; 12. 8. 80 Kiu inventis Esperanton?; 12. 9. 80 Letero de leganto
— **„Fahrt frei“,** GDR-fervojistoj, 2. 6. 80 Esperanto kaj popola interkompreniĝo
— **„Theorie und Praxis“,** Berlin, Scienca fakgazeto pri stenografio, 2/80 Adaptiĝo de Deutsche Stenographie je Esperanto-stenografio
— **„Mitteilungsblatt“,** Berlin, Organo de Kulturligo, Kultura interŝanĝo — Neubrandenburg—Koszalin; 4/80 Laboristaj esperantistoj
— **„Deutsche Post“,** Berlin, revuo pri poŝto kaj telkomunikado, 1/80 Telefona literumado en Esperanto; 6/80 Poŝto kaj Esperanto
— **„Tribüne“,** organo de la GDR-sindikato FDGB, Berlin, 5. 8. 80 Esperanto-Kongreso (pri UK en Stokholm)
= 22 artikoloj

2.2. Distrikto Dresden

— **„Sächsische Zeitung“,** Dresden, SED, 2. 2. 80 Renkonto de Turingiaj esperantistoj; 19. 3. 80 Per Esperanto en la ČSSR; 10. 4. 80 Lingvo kiu gajnas amikojn; 15. 5. 80 Esperantistoj el Pirna ĉe pacmarŝo; 4. 9. 80 Hobio en Kulturligo: Esperanto; 3. 10. 80 Esperanto-kurso en popola altlernejo; 10. 10. 80 „Klara Lingvo“ ne nur per telegrafo; 6. 11. 80 Esperantistoj el Leningrad en Kubo; 22. 11. 80 Aktiva agado de esperantistoj el Meißen; 12. 12. 80 Leteroj el tuta mondo; 22. 12. 80 Agado por la paco kaj internaciismo; 16. 9. 80 Publika Esperanto-prelego; 16. 10. 80 Esperanto-kursoj komenciĝis; 4. 12. 80 Esperantistoj renkontiĝas
— **„Die Union“,** Dresden, CDU, 6. 9. 80 Nombro de originalaj verkoj konstante kreskas; 6. 12. 80 Esperantistoj donis raporton; 20. 12. 80 UK en Stokholm
— **„Sächsisches Tageblatt“,** Dresden, NDPD, 9. 2. 80 Posteuloj de d-ro Zamenhof (ampleksa artikolo); 25. 4. 80 Esperanto — lingvo de interkompreniĝo; 5. 10. 80 Esperanto-kurso en la popola altlernejo
= 20 artikoloj

2.3. Distrikto Erfurt

— **„Das Volk“,** Erfur, SED, 26. 1. 80 Baldaŭ ankaŭ Esperanto; 4. 7. 80 Okupiĝo pri Esperanto; 9. 7. 80 UK sen tradukistoj; 11. 8. 80 UK en Stokholm
— **„Thüringer Tageblatt“,** Erfurt, CDU, 12. 8. 80 Esperanto-Kongreso (pri UK Stokholm); 22. 9. 80 Ankaŭ Esperanto evoluas; 20. 12. 80 Universala Kongreso en Stokholm); 5. 9. 80 Esperanto-ekspertoj el Heiligenstadt
— **„Thüringische Landeszeitung“,** Erfurt, SED, 4. 6. 80 Esperanto-jubileo; 20. 11. 80 Renkonto de esperantistoj; 21. 11. 80 Sur la spuro de la tradicio
— **„Thüringer Neueste Nachrichten“,** Erfurt, NDPD, 21. 11. 80 Esperanto-Historio
= 12 artikoloj

2.4. Distrikto Frankfurt/O.

— **„Neuer Tag“,** Frankfurt/O., SED, 18. 7. 80 Esperanto-renkonto; 30. 8. 80 Interkompreniĝo sen tradukistoj; 4. 9. 80 Lerni per koresponda kurso
= 3 artikoloj

2.5. Distrikto Gera

— **„Freie Presse“,** Gera, SED, 3. 1. 80 Esperanto — Novjaraj bondeziroj el la malproksima Taŝkent; 29. 2. 80 En Esperanto; 21. 2. 80 Post 4 monatoj oni povas skribi leterojn en Esperanto; 20. 8. 80 Intensiva kurso en Esperanto (SELKO-80)
— **„Volkswacht“,** Gera, 10. 1. 80 Esperanto — Novjaraj bondeziroj el Sovetunio; 14. 8. 80 Esperanto en intensiva kurso (SELKO-80)
— **„Freies Wort“,** Gera, 26. 7. 80 Popola altlernejo plenumas edukajn dezirojn (ankaŭ E-kurso)
= 7 artikoloj

2.6. Distrikto Halle

— **„Freiheit“,** Halle, SED, 17. 9. 80 Nova Esperanto-Kurso; 4. 10. 80 Ĉu vi scias, ke (pri Esperanto); 29. 11. 80 Jarkunveno de la Esperanto-rondo
— **„Neuer Weg“,** Halle, CDU, 11. 8. 80 Esperanto-Kongreso finiĝis (pri UK); 6. 9. 80 Nombroj de la originalaj verkoj kreskas; 27. 9. 80 Ankaŭ Esperanto evoluas
— **„Liberal-Demokratische Zeitung“,** Halle, LDPD, 5. 8. 80 UK Stokholm; 9. 9. 80 Nova Esperanto-Kurso; 11. 8, 80 UK Stokholm; 1. 11. 80 Esperanto-konferenco en Halle; 26. 11. 80 Kunveno de Esperanto-rondo
= 11 artikoloj

2.7. Distrikto Karl-Marx-Stadt

— **„Freie Presse“,** Karl-Marx-Stadt, SED, 30. 5. 80 Esperanto — letero — vespero; 3. 4. 80 Kun printempaj floroj venis kora invito; 11. 1. 80 Ankaŭ ĉijare aktivas la esperantistoj; 27. 2. 80 Elekto de la subdistrikta E-estraro; 7. 3. 80 Daŭrigi bonajn tradiciojn; 19. 6. 80 Esperanto-renkonto; 6. 9. 80 Por E-amikoj; 3. 10. 80 Trans landaj limoj; 28. 8. 80 Por amikoj de Esperanto; 18. 11. 80 Komenco de semajno de amikeco; 3. 12. 80 Lernantoj aranĝas programon kun esperantistoj
= 11 artikoloj

2.8. Distrikto Leipzig

— **„Leipziger Volkszeitung“,** Leipzig, SED, 31. 5. 80 Pli multaj informoj pri la laboro de KL; 6. 6. 80 Interesa renkonto kun esperantistoj el ČSSR; 26. 6. 80 Esperanto en la gazeto-festo; 16. 8. 80 Johannes R. Becher en Esperanto; 1. 9. 80 Kongreso en Esperanto (pri Bulgara EK); 9. 9. 80 Nova semestro komenciĝis (mencio pri E-kurso); 2. 8. 80 Varbado por Olimpio; 30. 9. 80 Esperanto — unika planlingvo (anonco); 31. 12. 80 Letero el Taŝkent esperantlingve
— **„Sächsisches Tageblatt“,** Leipzig, LDPD, 10. 5. 80 Renkontiĝo kun amikoj (ampleksa artikolo kun foto)
— **„Mitteldeutsche Neueste Nachrichten“,** Leipzig, NDPD, 31. 7. 80 Alvoko al esperantistoj; 5. 8, 80 Esperanto-kongreso; 29. 12. 80 Hungaraj esperantistoj
— **„Der Schmiedewerker“,** uzina gazeto, SED, 29. 10. 80 Interesa prelego; 11. 80 Koraj salutoj okaze de datreveno; 12. 80 Prelego interesis; 6. 80 Interesa leterinterŝanĝo (ampleksa artikolo kun fotoj)
= 17 artikoloj

2.9. Distrikto Magdeburg

— **„Volksstimme“,** Magdeburg, SED, 22. 3. 80 Interesuloj serĉataj; 18. 6. 80 Prelegoj en Esperanto; 6. 9. 80 Interparolo pri Esperanto; 16. 9. 80 Facile lernebla lingvo
= 4 artikoloj

2.10. Distrikto Neubrandenburg

— **„Freie Erde“,** Neubrandenburg, SED, 17. 1. 80 Politiko, arto, kulturo kaj scienco en la programo (mencio pri Esperanto en KL); 31. 1. 80 Prelego pri Esperanto; 1. 2. 80 Koresponda kurso; 19. 2. 80 Baza kurso pri Esperanto; 12. 4. 80 Ekde kiam ekzistas Esperanto?; 25. 6. 80 Gasto el la lando de la rozoj ĉe la esperantistoj; 2. 7. 80 Disdono de diplomoj en la klubo; 17. 7. 80 Esperantistoj el 17 landoj renkontiĝis; 30. 7. 80 Esperantistoj renkontiĝas; 11. 9. 80 Esperantotendaro en Thomsdorf (SEFT); 26. 9. 80 Esperanto-konferenco; 24. 9. 80 Internacia lingvo; 4. 10. 80 Esperanto; 14. 10. 80 Kurso por komencantoj; 18. 10. 80 Renkontiĝo de Esperanto-junularo
— **„Norddeutsche Zeitung“,** Neubrandenburg, LDPD, 23. 9. 80 Esperanto en klubejo
— **„Neueste Nachrichten“,** Neubrandenburg, NDPD, 20. 9. 80 Esperanto
— **„Demokrat“,** Neubrandenburg, CDU, 25. 9. 80 Esperanto-konferenco
= 18 artikoloj

2.11. Distrikto Potsdam

— **„Märkische Volksstimme“,** Potsdam, SED, 3. 5. 80 80 jaroj Esperanto en Bulgario; 7. 11. 80 Internacia Esperanto-seminario
— **„Märkische Union“,** Potsdam, CDU, 6. 9. 80 Nombro de originaj verkoj konstante kreskas
— **„Brandenburgische Neueste Nachrichten“,** Potsdam, NDPD, 26. 4. 80 80 jaroj Esperanto en ĝemela urbo; 5. 8. 80 Walisisch kaj Esperanto
— **„Der Morgen“,** Potsdam, LDPD, 5. 4. 80 Paskaj salutoj el Ruse
= 6 artikoloj

2.12. Distrikto Rostock

— **„Ostseezeitung“,** Rostock, SED, 8. 1. 80 De Esperanto ĝis Duett; 31. 10. 80 Salutoj el Taŝkent; 22. 1. 80 Popola altlernejo instruas lingvojn, ankaŭ Esperanton;

4. 8. 80 UK en Stokholm; 9. 9. 80 Esperanto-kurso por interesuloj; 23. 9. 80 Nova kurso por komencantoj; 16. 10. 80 Korespondo per Esperanto
— **„Norddeutsche Neueste Nachrichten“,** Rostock, NDPD, 13. 3. 80 Kontaktoj; 26. 7. 80 Walisisch kaj Esperanto; 15. 8. 80 Tursmo kaj Esperanto; 15. 10. 80 La Kulturligo invitas; 9. 9. 80 Hodiaŭ 18,15 horo (invito al Esperanto-kunveno); 11. 11. 80 Pli facila per Esperanto; 27. 12. 80 Hungaraj esperantistoj
— **„Norddeutsche Zeitung“,** Rostock, LDPD, 21. 11. 80 Vizito de esperantistoj en ŝipista kompanio (en platgermana lingvo); 16. 12. 80 Bilanco de Kulturligo (mencio pri Esperanto)
= 16 artikoloj

2.13. Distrikto Schwerin

— **„Schweriner Volkszeitung,“** Schwerin, SED, 18. 4. 80 La infanoj povas senti sin feliĉaj; 6. 3. 80 Pligrandigata leterinterŝanĝo; 3. 5. 80 Renkontiĝo de nordaj distriktoj; 4. 8. 80 Universala Kongreso; 14. 6. 80 Por pli bona interkompreniĝo; 19. 6. 80 Internacia komunikado per Esperanto; 18. 9. 80 Anonco pri E-kurso
— **„Norddeutsche Neueste Nachrichten“,** Schwerin, NDPD, 24. 8. 80 Esperanto-renkontiĝo; 11. 8. 80 La 65a UK; 10. 9. 80 Internaciaj Esperanto-kontaktoj
— **„Norddeutsche Zeitung“,** Schwerin, LDPD, 29. 2. 80 Post leterinterŝanĝo sekvis vizitoj (kun foto); 8. 8. 80 Kontraŭ diskriminacio; 16. 8. 80 Lingvaj studoj en la naturo; 9. 9. 80 Renkontiĝo de partneraj urboj
— **„Der Demokrat“,** Schwerin, CDU, 19. 4. 80 Esperanto sur scenejo; 4. 8. 80 UK en Stokholm; 10. 9. 80 Esperanto-renkontiĝo de partneraj urboj; 27. 9. 80 Ankaŭ Esperanto evoluas; 20. 12. 80 UK en Stokholm
= 19 artikoloj

2.14. Distrikto Suhl

— **„Freies Wort“,** Suhl, SED, 3. 5. 80 Renkonto de esperantistoj
— **„Thüringer Tageblatt“,** Suhl, CDU, 15. 11. 80 Ni lernas dialogojn de la ĉiutaga vivo
= 2 artikoloj

Kompilis Werner Pfennig

Komento

1. Entute aperis (kune kun 25 „Der Morgen“-artikoloj) 1980 193 artikoloj, pri kiuj ni eksciis (1979: 180), do iom da kresko.
2. Estas videbla, ke la nombro de artikoloj en centraj organoj restis konstanta kompare al 1979. Novaj titoloj estas la fakorganoj „Deutsche Post“ kaj „Theorie und Praxis“ (stenografio).
3. La plej sukcesaj distriktoj (en krampo la kompara cifero de 1979) estis

Dresden	20	(13)
Schwerin	19	(13)
Neubrandenburg	18	(16)
Leipzig	17	(9)

4. Relative multaj, almenaŭ laŭ la ĝisnunaj spertoj, 1980 aperis en la partia ĉef-organo „Neues Deutschland“, nome 7 (1979: 2).
   Tre grava ankaŭ estis la 4 kontribuoj en „Wochenpost“, post „FF dabei“, la semajna revuo kun la plej alta eldonkvanto.
5. La diferencoj inter la unuopaj distriktoj ne nepre estas absoluta mezurilo por malsama aktiveco.
   Evidente la raportado al la gazetaro kaj la kontaktado al redaktoroj ankoraŭ ne estas sufiĉe serioze organizitaj. Jen grava tasko por la distriktaj kaj subdistriktaj estraroj.
6. Sufiĉe malofte oni utiligis la fabrikgazetojn, ebleco nepre pli forte eluzenda en la estonto.

Ankaŭ 1980: Kontribuoj de Peter Levsen

En la taggazeto „Der Morgen“, organo de la Liberaldemokratia Partio en GDR, aperis jenaj kontribuoj de Peter Levsen, en la konata serio pri Esperanto, kiu funkcias seninterrompe ekde la jaro 1965. Ni esperantigas la titolojn:

459: Arto de instruado. pri metodika materialo de d-ro Dahlenburg (4. 1. 80)

460: Dialektoj en la planlingvo? Pri prononcado de Esperanto (25. 1. 80)

461: Ne nur reloj kunligas. Pri fervojistoj-esperantistoj (8. 2. 80)

462: Esperanto je feria kurso. Internaciaj turismaj aranĝoj (15. 2. 80)

463: Perditaj presprovajoj. Pri esperantigitaj verkoj de Korczak kaj Fučik (29. 2. 80)

464: Rigardoj en la utopion. Esperanto en la sciencfikcia literaturo (14. 3. 80)
465: Problemoj de la lingvo. Recenzo pri la „La internacia lingvo: sciencaj aspektoj“ (25. 3. 80)
466: La ŝlosilo al la lingvo. Enrigardo en la strukturon de Esperanto (11. 4. 80)
467: ABC de konjugacio (25. 4. 80)
468: Komuna agado en la centro Pri la 13a Konsultiĝo en Sofio (9. 5. 80)
469: Amiko gaste. Pri restado de prof. Podkaminer en GDR (23. 5. 80)
470: Pri nombroj kaj fremdvortoj. Iom da Esperanto-gramatiko (6. 6. 80)
471: Esperanto-prelegoj. Medicinistoj diskutas en la planlingvo (20. 6. 80)
472: Pri la sistemo de vortfarado (4. 7. 80)
473: Planlingve al la Olimpiko. Esperanto kaj sporto (18. 7. 80)
474: 50 nacioj kaj unu lingvo. Pri la 65a UK (1. 8. 80)
475: La 65a Universala Kongreso en Stokholmo. Internaciaj debatoj pri diskriminacio (15. 8. 80)
476: Universala Stenografio? Nova adapto de Otto Möller (29. 8. 80)
477: Gardo de la homa medio. Pri SAEST en Usti (12. 9. 80)
478: Pri la radikoj de la lingvo. La Fundamento de Esperanto (26. 9. 80)
479: Kolekto da prozo kaj liriko. Fundamenta-Krestomatio (10. 10. 80)
480: Difinaj vortaroj de Esperanto: PV kaj PIV (7. 11. 80)
481: Seminario de la junularo. Pri internacia seminario en Rathenow (21. 11. 80)
482: Lingvo de komputiloj? Pri la 2a interlingvistika seminario de GDR-lingvistoj (5. 12. 80)
483: Enciklopedio de Esperanto kaj Esperanto en Perspektivo (19. 12. 80)

Sendu viajn rimarkojn kaj dezirojn pri la Esperanto-serio al la redakcio „Der Morgen“, 1080 Berlin, Johannes-Dieckmann-Straße 47.

Denove riĉenhava GDR-„Paco“ 1981

Jen, denove, „Paco“, eldono de la MEM-sekcio de Germana Demokratia Respubliko. Ekde 1966, ĉiujare aperas en GDR unu 40-paĝa, riĉe ilustrita kaj varienhava kajero. Ankaŭ ĉijare ĝi enhavas materialojn pri tutmondaj pacproblemoj, literaturajojn, interlingvistikajn-esperantologiajn kontribuojn, recenzojn k. t. p.
Jen la ĉefa enhavo:

— Prof. Sahnasarov: Tutmonda problemoj kaj la estonteco de la homaro (p. 2 — 3)
— Mirovsko/Šiškov: Malsato en la „Tria Mondo“ (4 — 6)
— W. Roschlan: La vetarmado (7)
— R. Marian: La filmstelo kaj la prokrasta bombo (10)
— Kampuĉio — La helaj tagoj komenciĝis (11)
— L. Serrano: Kun pacamika saluto el Hispanujo (13)
— A. Harkovski: La tria lingvo de la skolto Kuznecov (14 — 15)
— Rememoroj pri Ludwig Renn (16)
— D. Blanke: Pri la problemo de laŭplana influado je la lingvoevoluo fare de la homo (p. 24 — 31)
— C. Murgin: L. L. Zamenhof dum la revolucioprepara periodo 1910 — 1914 (p. 34 — 35)
— B. Golden: Pri la influo de la germana lingvo sur Esperanton (p. 37)

Krome enestas en la kajero poemoj de J. R. Becher, Heinrich Heine, Bertolt Brecht, Merata, Tamošiuniene, Zlatarski, Kalocsay, Balbin, Topirecanu, Arnold; prilingvaj artikoloj, 10 recenzoj, koresponddeziroj kaj aliaĵoj. La abonantoj de „Paco“ aŭtomate ankaŭ ricevos la GDR-numeron. Aparta mendo (1 marko) eblas ĉe Esperanto-Asocio de GDR (1080 Berlin, Charlottenstraße 60).

Serĉata „Pacaktivulo“

Por entreprenota studo pri la historio de la rilatoj inter Pacmovado kaj Esperanto mi bezonas la numerojn 1 — 51 de „Pacaktivulo“. Rekompenco per esperantajoj. Skribu al D-ro Detlev Blanke, GDR - 1054 Berlin, Rosenthaler Straße 2.

Gelernejana Esperanto-Kampadejo (GEK) en Berlin

Unuan fojon en GDR 1981 okazis renkontiĝo de gelernejanoj scipovantaj aŭ lernantaj Esperanton.

27 junaj esperantistoj, de la tria ĝis oka klasoj el la distriktoj Halle, Suhl, Neubrandenburg kaj Schwerin pasigis Esperanto-feriojn de la 13a ĝis 17a de julio 1981 en la pionirparko „Ernst Thälmann" en Berlin. Ili loĝis en kabanetoj, manĝis ĉe bela vetero sub pinarboj kaj dum du horoj potage lernis Esperanton. La aliajn partojn de la tago la gelernejanoj pasigis ĉe varia programo, al kio apartenis vizito de la pionirpalaco, sportado (tabloteniso, ŝakludo, badmintono, banado en la pionirpalaca naĝejo, grimpado en ludkastelo k. a.). Oni ankaŭ organizis tablotenisan konkurson (de Andreas Kurtz), desegnadan konkurson (de s-ino Helga Plötner), viziton de la bestĝardeno kaj vesperan esperantlingvan kantadon. Sed ankaŭ estis tempo por ekskurso tra Berlin por konatiĝi kun la ĉefurbo kaj aĉeti memorajojn. Vizitis la kampadejon ankaŭ d-ro Blanke, kiu demonstraciis kelkajn sonbendojn kaj parolis pri Esperanto kiel taŭga ilo por mondo senmilita. (Ege amuzis la gelernantojn la balado de „Verda ĉapo.)

Ke tiu aranĝo sukcesis oni devis danki al Fritz Wollenberg el Berlin, kiu ĉion bonege antaŭpreparis, al Edeltraut kaj Achim Zettier, kiuj instruis la lingvon kaj tre sperte gvidis multajn aliajn programpunktojn, al s-ino Plötner el Gräfenhainichen kaj Helmut Paul el Suhl, kiuj kiel grupestroj bonege prizorgis la infanojn.

Konsciante la fakton, ke en multaj landoj ĉiujaraj infanoj renkontiĝoj jam havas longan tradicion (i. a. en Pollando, ČSSR, Hungario kaj Bulgario) ege necesis, ke io simila finfine okazu ankaŭ en GDR. Ĝi estis provo sukcesa, post kiu oni scias kiel ankoraŭ pli bone prepari kaj organizi la duan, kiu espereble okazos dum somero 1982 denove en Berlin.

(laŭ materialo de E. Zettier)

Dankon pro gratuloj

Asocio de Sovetaj Esperantistoj sendis al GDREA okaze de la 32a datreveno de la fondiĝo de GDR ampleksan gratultelegramon, pro kiu ni tre kore dankas.

Prezidio de GDREA

Planlingvo kiel faklingo

Pri la tria interlingvistika seminario por GDR-sciencistoj en Ahrenshoop

Ke inter GDR-sciencistoj ne mankas serioza intereso pri interlingvistiko kaj sciencaj aspektoj de Esperanto, ni jam plufoje klarigis diversloke (kp. „der esperantisto" n-roj 95 kaj 105)[1]) Ankaŭ la tria seminario denove preparita kaj okazigita de la Fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio kun helpo de Humboldt-Universitato en Berlin (katedro pri komunikada scienco, prof. d-ro Georg F. Meier), tion tre elokvente pruvis. Ĝi okazis de la 11a — 15a de oktobro 1981, denove en la alloga ĉebaltmara banloko Ahrenshoop. Konsiderante la fakton, ke bazan interlingvistikan informitecon intertempe oni povus atendi ĉe la invitotaj lingvistoj pro diversaj publicaĵoj ĉi-temaj en GDR kaj pro tio, ke Esperanto finfine nur tiam trovus seriozan konsideron flanke de la lingvistika kaj scienc-teknika intelektularo, se ĝi kapablas altnivele funkcii kiel faklingvo kun evoluinta terminologio, ni donis la kadran temon „Planlingvo kiel faklingvo". Tio ankaŭ respondas al la observebla tre salutinda internacia tendenco, finfine iom pli sisteme kaj laŭplane starigi la diversajn problemojn de la faka uzado de Esperanto.

Kompreneble la dissenditaj detalaj tezoj pri la temo eliris de la larĝa interdisciplina interlingvistika koncepto, kiu estas flegata en GDR kaj jam pro tio ne forpuŝis lingvistojn, kiuj eble tute ne estas konvinkitaj pri la terminologia perspektivo de Esperanto. Ĉiu atendis lerni ion novan por sia fako, kvankam sub nova, eble nekutima aspekto, kaj ili ne estis trompitaj. Tre severe la gvidantoj de la seminario certigis absolute malverdan, seriozan sciencan atmosferon.

La seminarion partoprenis entute 30 sciencistoj de 19 altlernejoj kaj sciencaj institutoj de GDR, inter ili 11 teknikaj altlernejoj kaj institucioj kaj la Akademio por Pedagogiaj Sciencoj. La interdisciplinan profilon de la seminario kunformis la partoprenintoj, kiuj estis 13 lingvistoj, 4 informadsciencistoj, 7 faklingvaj lektoroj en altlernejoj, 3 pedagogoj, 2 teknikistoj kaj 1 medicinisto. Eĉ la rektoro de inĝeniera altlernejo Zwickau partoprenis. La sinsekvo de la prelegoj estis metodike motivita. La enkondukaj prelegoj traktis „lingvistikajn aspektojn ĉe la prilaborado de sciencteknikaj informoj" (prof. d-ro Georg Friedrich Meier, Humboldt-Universitato) kaj „interlingvistikon: objekto, problemoj, rezultoj" (d-ro Detlev Blanke). Sekvis „lingvistikaj aspektoj de la angla kiel internacia komunikilo" (d-ro Harald Hecker, Karl-Marx-Universitato, Leipzig) kaj „problemoj ĉe la lernado de faklingvoj" (d-ro Wolf-Dietrich Wendt, Humboldt-Universitato). Tre energie substrekis la rektoro de la Inĝeniera Altlernejo el Zwickau, prof. d-ro Franz Meißner, la „utilecon de internacia planlingvo el la vidpunkto de teknikisto". La direktoro de la universitata biblioteko en Halle, prof. d-ro Joachim Dietze, montris, ke „Esperanto kiel lingvo de informadiko" tute bone taŭgas. D-ro Erich Spitz de la Mineja Altlernejo Ostrava/ČSSR, traktis „demandojn de la fonologio sub interlingvistika aspekto" kaj doc. d-ro Otto Troebes (Universitato Halle) prezentis leksikografiajn problemojn surbaze de la konataj vortaroj rusa—Esperanto kaj Esperanto—rusa 1966 kaj 1974. La por terminologio gravajn lingvistikajn kvalitojn de Esperanto kaj la principojn de la terminoformado en Esperanto pritraktis d-ro Detlev Blanke („Esperanto kiel faklingvo"). Inĝ. Linde Knöschke (Instituto por reguligo-tekniko) resumis „la ĝisnunan staton de la sciencteknika aplikado de Esperanto". D-ro Till Dahlenburg (fakinstruisto) prezentis la sufiĉe neunuecan „gramatikan terminologion de Esperanto" kaj komparis ĝin kun la rusa. Inĝ. Heinz Hoffmann (Altlernejo por Trafiko, Dresden) montris „kiel oni formadas fervojan fakterminojn en Esperanto". „La aŭtomatan prilaboradon de informaĵoj" traktis prof. d-ro Georg F. Meier kaj d-ro Paul String (Robotron Dresden) prezentis „aŭtomatan sintezon de vortoj kaj frazoj en Esperanto".

Fine de la seminario la ĉeestantoj, post multaj interlingvistikaj kaj neinterlingvistikaj sed ĉiam altnivelaj diskutoj, interŝanĝis ideojn pri iniciato de sistemaj interlingvistikaj esploroj en GDR kaj konvenaj paŝoj por ilin atingi, de kiuj la unuaj ĉe Humboldt-Universitato en Berlin jam estas entreprenitaj.

La partoprenantoj mem kelkfoje substrekis la por ili ege altan informvaloron de la seminario, kiu malfermis antaŭ ili ne nur gravajn sciojn sed ankaŭ novajn vidpunktojn ĝis nun al ili ankoraŭ nekonatajn. Estas interese ĉiam denove konstati ĉe sufiĉe altrangaj sciencistoj profundan intereson pri interlingvistikaj problemoj kaj pri Esperanto. Se ili renkontas seriozajn diskutpartnerojn, tiu intereso povas ŝanĝiĝi en aktivan engaĝiĝon.

Ciutage dum la paŭzoj kaj post la programo ili rigardis kaj trafoliumis iujn el la pli ol 150 faklibroj (interlingvistiko, esperantologio, fakvortaroj k. t. p.) kaj notis titolojn.

Sendube la seminarianoj informos pri la rezultoj en siaj altlernejoj kaj institucioj, invitos membrojn de la Fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio al prelegoj kaj

per sia scienca reputacio kontribuos al paŝon-post-paŝa instituciigo de interlingvistika esplorado kaj instruado en GDR.

Tiuj seminarioj pruviĝis kiel tre intensiva, efika kaj multobliga metodo de scienca agado, certe ankaŭ imitebla en aliaj landoj. La kvara seminario jam estas planita, okazos novembre 1982 kaj verŝajne enhavos kiel plue specialiĝintan komponenton leksikologiajn kaj leksikografiajn problemojn sub interlingvistika aspekto.

Detlev Blanke

Komparu ankaŭ „der esperantist" n-ro 71 (3/1975) kaj en „La internacia lingvo: sciencaj aspektoj", paĝoj 100 — 109, krome GDR-Paco 1981, p. 32.

Aperis la disertacio de Blanke

La Centra Instituto por Lingvoscienco ĉe la Akademio de Sciencoj de GDR enkadrigis la doktorigan disertacion de Detlev Blanke (komparu „der esperantist" 5 + 6/1976) en la serion **„Linguistische Studien — Arbeitsberichte (Reihe A)** kiel **n-ron 85 (Berlin 1981).** Por la celo de la publikigo la disertacio estis forte koncizigita (160 paĝoj) kaj aperis sub la titolo **„Plansprache und Nationalsprache. Einige Probleme der Wortbildung des Esperanto und des Deutschen in konfrontativer Darstellung".** El la originala disertacio mankas la ampleksa ĉapitro pri lingvoplanado (ĝi aperis komplete en esperantlingva traduko en la GDR-numero de „Paco" 1981). Sed estas tute reverkita kaj ampleksigita la ĉapitro „Lingvistika karakterizo de Esperanto". La bibliografio listigas pli ol 200 titolojn. (La originalo enhavas 400.)

La serio en GDR estas tre grava, ĉar pli ol 500 lingvistoj ĝin abonas kaj pluaj centoj aĉetas. Ekster GDR oni povas ricevi la kajerojn de la serio pere de la internaciaj librovendejoj (prezo 10 m. por eksterlandanoj).

La libro estas aĉetebla ĉe GDREA (1080 Berlin, Charlottenstr. 60) kaj kostas 5 markoj (por GDR-civitanoj), por eksterlandanoj: 10 gm.

Sukcesaj rilatoj inter Potsdam kaj Ruse

Kulmino de niaj kelkjare ekzistantaj rilatoj kun la distrikta estraro de la Bulgara Esperanto-Asocio Ruse, kiuj baziĝas sur kontrakto pri amikeco kaj kunlaboro, estis la ĉijara partopreno de potsdama delegacio al la Printempa-Amikeco-Renkontiĝo Esperantista (PARE) en nia partnera urbo Ruse. Tiu aranĝo (11.—12. 4. 1981) estis dediĉita **al la 1300-jara ekzisto de la bulgara ŝtato.** Gin partoprenis pli ol 220 partoprenantoj!

La solena inaŭguro kun salutparoladoj kaj ampleksa kulturprogramo precipe montris al ni la socialisman evoluon de la bulgara frata popolo en nia ĝemela distrikto. Tre atenteme nin prizorgis la esperantistoj el Ruse dum nia kvintaga restado en ilia urbo. Plena da renkontiĝoj, aranĝoj, personaj invitoj k. t. p. rapide forpasis la tempo. Menciindas la tuttaga aŭtoekskurso al la historioj bulgaraj urboj Pliska (la unua ĉefurbo), Madara kaj Šumen. Memkompreneble ni ankaŭ priparolis venontajn taskojn kaj celojn por plufirmigi niajn rilatojn. Certe helpos al ni la ekzemplodonaj spertoj de la bulgaraj emikoj je la solvo de novaj taskoj.

Riĉplenajn impresojn ni hejmen prenis pri la homoj, vivkondiĉoj k. t. p. La plej eminenta estas, laŭ nia opinio, la korega amikeco kaj gastameco flanke la bulgaraj esperantistoj. Pli ol dudek amikoj nin adiaŭis sur la perono de la stacidomo Ruse per floroj kaj donacoj tiel korege . . . certe longtempe neforgesebla. Dankon al niaj bulgaraj esperantistoj, dankon ankaŭ al la rumanaj amikoj, kiuj helpeme subtenis nin ĉe la reguligo de diversajoj rilate nian pluveturadon kaj je la gvidado tra ilia bela ĉefurbo Bukureŝti.

Karl Müller

Phöben 81

Temas pri junulara aranĝo, kiu okazis de la 9a ĝis 14a de majo 1981 en Phöben, distrikto Potsdam.

Ĉi tiu raporto estu kolekto de impresoj de la pasinta kaj elekto de ideoj direktitaj al sekvonta aranĝo. Do tiu estis intensa kurso, kaj jam nun direndas, ke ĝi esti bona kaj sukcesa. Nu certe, ekzistas partoj, kiuj estas plibonigeblaj, eĉ plibonigendaj, kaj ekzistas pli altnivelaj aranĝoj (ĉu entute ekzistas aliloke intensaj junularaj kursoj? — la red.). En la aktuala stadio de nia respublika junulara laboro jam la fakto, ke junaj esperantistoj povas revidi unu la alian, ke junuloj agantaj sole aŭ malgrandgrupe povas konatiĝi kun aliaj junaj esperantistoj, donas valoron al tiu aranĝo.

Do samtempe kun tiu konkludo ni trovis unu problemon: La plej granda parto de niaj gejunuloj ĝenerale aliĝas al iu ajn aranĝo preskaŭ sendepende de formo, tasko aŭ celo de tiu renkontiĝo Ili ja nur volas partopreni. Iu eble veturas al intensa kurso kaj volas tie feriadi sed ne labori. Nu, sed tiukaze li malbone legis la invitilon.

Por esti honesta: La partoprenantoj en Phöben ne estis tiaj. Ili venis por lerni la lingvon. Laŭdinde la junulara komisiono invitis junaĝan kaj junecan instruiston. Estis Stano Marĉek, prezidanto de Junaj Esperantistoj en Slovakio/ČSSR, la slovaka „frato" de Esperanto-Junularo de GDR. Li ne nur havis bonan kontakton al la partoprenantoj, sed ankaŭ serĉis kaj trovis novajn metodojn en la instruado. Stano konas la ofte strečan lingvo-instruadon en la lernejo.

Li prezentis interesan kaj interesigan instrumetodon: aŭdvidan kurson por progresantoj kaj por komencantoj, samtempe (!) specimenojn de lia aperonta lernolibro. La aŭdvida kurso enhavas aŭdigon de la teksto per stereofonia kasetmagnetofono (kiu bedaŭrinde en Phöben estis nur unuvata monofonia) kaj paralelan elmontradon de respektivaj bildoj. Poste la gelernantoj respondis demandojn, denove aŭskultis la tekston kaj mem devis rerakonti ĝin. Akustikaj efektoj, ekzemple popularmuzikaj, ĉiam denove vekis la atenton.

La paraleligo de du kursoj kaŭzis iujn problemojn, kiujn Stano solvis tre lerte. Certe estus senchave, se estonte oni invitus ne nur eksterlandan instruiston, kiu ne scipovis la germanan kaj tial plenumis perfektan rektmetodan kurson, sed ankaŭ eksterlandajn partoprenantojn.

Plue la partoprenantoj aŭskultis prelegojn pri la junulara Esperanto-movado en GDR kaj pri kanzonoj en la Internacia Lingvo. Ili ankaŭ vizitis Potsdam-on.
Fine sed ne lastrange — dankon al la aranĝintoj (ĉefe al nia multokupita Detlef Stoll), kiuj zorgis por disponigo de tranoktejo, manĝado ktp. La manko de tiuspecaj ejoj ja ofte kaŭzas, ke ni ne havas pli da junularaj aranĝoj. Do denove ankaŭ en la nomo de la aliaj 31 kursanoj — dankon!

Rainer Zinke, Berlin

Malriĉiga perdo

Leginte pri la forpaso de Otto Bässler skribis al nia la brita esperantisto kaj komunisto Bill Keable el London:
Karaj Kamradoj,

Mi ŝokiĝis ricevi la malĝojan informon ke forpasi mia dumlonga samgeneracia kamarado Otto Bässler.

84-jara vivo kiel lia estas triumfo kaj inspiro por nia komunisma afero.

Mi ĝojas ke prosperis al mi ĝui kelkajn tagojn ĉe li kaj Frieda en 1973, kiam eblis al mi lerni el lia propra buŝo pri lia partoprenado en la historia lukto kontraŭ ĉiaj obstakloj por nia komunisma afero. Kaj mi dankas mian bonŝancon ke je kristnasko lasta, trovi-ĝante surprize en Leipzig, mi povis ĝui vesperon kun li kaj lia familio, kiam mi denove sentis la inspiron de lia personeco.

Pro lia forpaso ni ĉiuj estas iom malriĉiĝintaj. Mi petas ke la esperantistoj kaj ĉiuj civitanoj de via socialisma respubliko, kiuj tiom ŝuldas al li kaj liaj samspeculoj, akceptu mian profundan kunsenton.

Kamaradece Bill Keable

Ni kore gratulas

— al Rudolf Eichler, iama laborista esperantisto, naturamiko kaj tre aktiva gvidanto de la grupo en Schwarzenberg okaze de lia 70a naskiĝtago (20. 9. 1981). Li ricevis pro multjara merita agado en Kulturligo la Johannes-R.-Becher-Medalo en arĝento;

— al D-ro Till Dahlenburg pro distingo per la Johannes-R.-Becher-Medalo en arĝento.

Ni funebras

— pro la forpaso de la interlingvisto Kurt Neumann (1. 9. 1981) el Dresden, kiu donis sian kontribuon al la mondlingva ideo;

— pro la forpaso de Wilhelm Zimmermann (14. 9. 1981) el Fürstenwalde, kiu apartenis al la fondintoj de Centra Laborrondo kaj estis longjara membro de ties prezidio. Kiel iama laborista esperantisto li migris 1927 per Esperanto tra Sovetunio kaj ligis kontaktojn vivajn ĝis lia morto. Ni memoros lin kiel klaskonscian kaj senlacan esperantiston;

Legu kaj lernu! Lies und lerne! (11)

Raymond Schwartz (1894–1973) estis franco, kiu skribis multajn, originalajn poemojn. Plej ofte humurajn. Unu el ili mi prezentas al vi.

La nova jar'

1. La Nova Jar', la Nova Jar'
La homojn plibonigas!
Sur ĉiu strat', en ĉiu dom'
Afabla estas ĉiu hom',
La Nova Jar', la Nova Jar'
La homojn afabligas!

2. La pordistin', la pordistin'
nun ĉiam bonhumoras!
Antaŭe vane kaj sen fin'
Dumnokte mi petegis ŝin,
Sed nun ŝi enirigas min
Tuj kiam eksonoras!

3. La poŝtportist', la poŝtportist'
Deĵoris tre malbone!
Ne venis li dum pluvveter'
Kaj nur malofte dum somer',
Sed eĉ por simpla cirkuler'
Li venas nun persone!

4. Kaj la barbist' traktadis min
Samkiel malamikon!
Li senhezite, laŭ okaz',
Detranĉis pecon de la naz',
Kaj li al mi sen parafraz'
Manĝigis la penikon!

5. Sed la barbist', sed la barbist'
Min razas nun senvunde!
Kaj kun ĝentila kompliment'
Li diras, plena je atent':
„De viaj haroj cent procent
Rekreskas tre abunde!"

6. Restoracia ĉefkelner',
Li estis ĉefbarbaro!
Al mia frako kaj kravat'
Ŝprucigis saŭcon kun salat',
Sed denun li por korkompat'
Ĝin versas al najbaro!

(Vi povas ankaŭ kanti laŭ la melodio: O Tannenbaum)

Klarigoj:

originala — ursprünglich, original;
humuro — Humor Atentu! humoro = Laune;
plibonigi — besser machen, verbessern (pli-bon-ig-i);
poŝtportisto — Briefträger (poŝto + portisto);
deĵori — dienen;
cirkulero — Rundschreiben;
barbisto — Barbier (barbo = Bart);
vundo — Wunde;
komplimento — Kompliment;
rekreski — wieder wachsen (re + kreski);
pordistino — Pförtnerin (pord-ist-in-o);
senhezite — ohne Zögern, anstandslos (heziti = zögern, schwanken);
peco — Stück;
parafrazo — Umschreibung;
peniko — Pinsel;
barbaro — Barbar;
frako — Frack;
ŝprucigi — bespritzen (ŝpruc-ig-i);
saŭco — Soße, Brühe;
versi — gießen.

Honorigo de Esperanto-poeto

En februaro ĉi-jare okazis solena kunveno de Moskva Internacia Esperanto-Klubo (MIEK), dediĉita al la memoro de nia eminenta Esperanto-poeto Konstantin Miĥajloviĉ Gusev.

En la granda salono de la Kulturpalaco de Metrostroj (konstruantoj de Moskva metroo) ĉeestis ĉirkaŭ 200 gesamideanoj kaj geamikoj de K. M. Gusev. Krom tio estis: Ljudmila Guseva (lia vidvino) kaj Viktoro Gusev (lia filo), ankaŭ multaj liaj kunlaborantoj el la redakcio de gazeto „Pravda", kie laboris la forpasinto.

Kun rememoroj pri K. M. Gusev elpaŝis lia amiko — kritikisto Eugeno Osetrov, kiu rakontis pri la alta nivelo de originala kaj traduka poezio de K. M. Gusev. Estis cititaj kelkaj liaj versaĵoj. Pri la granda poresperanta laboro de K. M. Gusev rakontis k-do V. V. Samodaj, kiam ili kune efektivigis la eldonojn de kantoj kaj poeziaĵoj en Esperanto sub la egido de l'Komisiono de kunligo de Sovetaj Esperantistoj kun eksteraj landoj en la tempo, kiam ankoraŭ ne estis fondita la Asocio de Sovetaj Esperantistoj (ASE). Precipe lia laboro estis fruktodona en la amika kvaropo: Hoves, Rublev, Gusev kaj Grigorjev, kiam aperis kelkaj eldonoj de iliaj poeziaĵoj. La poeto kaj amiko de Gusev — Nik. D. Timakov, kiu kune laboris en la eldonejo „Pravda" — rakontis pri la eminenta kapableco kaj granda laboremo de Gusev, kiu talente kaj altnivele kreis proprajn poeziaĵojn kaj faris tradukojn ĉu rusen aŭ el la rusa lingvo. Post la oficiala parto, komenciĝis la arta parto, dum kiu sonis muziko, kantoj, recitaĵo, deklamado kaj legado de verkoj de K. M. Gusev. Partoprenis esperantistoj kaj ankaŭ neesperantistoj, artistoj de la Moskva Filharmonio. Post ĉiu plenumita programero la filo de K. M. Gusev, Viktoro, donacis florojn al la plenumintoj. La vespero estis tre impresiva kaj pasis en tre alta kultura kaj arta nivelo. La vidvino de K. M. Gusev dankis la ĉeestantojn pro la tiom varma kaj kora honorigo de la hela memoro de ŝia edzo, precipe dankis la estraron de MIEK pro la okazinta aranĝo. En la vestiblo de l'halo estis organizita ekspozicio de fotoj el la vivo kaj agado de K. M. Gusev, libroj de liaj verkoj kaj revuoj kun liaj versaĵoj kaj artikoloj.

La Esperanto-Movado en Moskvo ĉiam progresas. Oni kunvenas regule ĉiudimanĉe vespere.

Teodoro Kulagin

Kontribuu al ekspozicioj

1. Novosibirska Centra Esperanto-Klubo organizas en urba pentraĵgalerio grandan internacian ekspozicion de infandesegnaĵoj laŭ temoj:
   1. Mia lando
   2. Ni deziras pacon!
   3. Mia ŝatata bildo kaj aliaj.

   Sendu al ni desegnaĵojn faritajn per iu ajn tekniko. Surdorse skribu nomon, aĝon, sekson kaj plenan adreson de aŭtoro.

   Ĉiuj ricevos dankotekston sur bildkarto. Aŭtoroj de la plej bonaj desegnaĵoj ricevos per poŝto specialajn premiojn en rusa stilo.

   Aĝo: 3 — 15 j. Limdato: 15. 4. 1982
   Adreso: SU 630 099 Novosibirsk 99, abonkesto 213, Esperanto-klubo.

2. Kirova Esperanto-Klubo aranĝos ekspozicio-konkurson de E-plakatoj. Plakatoj povas esti presitaj, desegnitaj aŭ pentritaj. Aŭtoroj de plej bonaj plakatoj estos premiotaj.

   Samtempe okazos ekspozicio de E-emblemoj, E-bildkartoj, E-glumarkoj kaj aliaj diversaj esperantaĵoj, dediĉota al la komenco de E-kursoj en nova lernojaro. Ĉiu sendinto estos rekompencota per memoraĵoj pri nia bela urbo, aŭ laŭdezire ni resendos la materialojn.

   La plakatojn kaj la materialojn por la ekspozicio sendu, laŭ adreso: USSR, 610 000 u. Kirov, abon., jaŝĉik 140, Kirova Esperanto-klubo.
   Antaŭdankas vin Kirovaj geesperantistoj.

3 Novuloj el la juskreita ĉe Moskva aŭto-voja instituto E-klubo „Starto" tre petas helpon en organizo de la ekspozicio „Aŭtoj, vojoj, pontoj, flughavenoj, trafikaĵo, voja tekniko de la mondo", kiun la klubo planas okazigi propagandcele por 8 miloj da studentoj de la instituto aprile de la jaro 1982. Ni dankeme akceptus reklaman kaj ilustran materialon (ankaŭ nacilingvan) pri la temo (afiŝojn, kalendarojn, prospektojn, bildkartojn k. t. p.). Ni klopodos pri rekompenso laŭ via bontrovo. La materialo estas akceptata ek de nun kaj ĉiam (ni intencas fari ĉi ekspozicion regule, de fojo al fojo renovigante ĝin).
   Krome, ni organizas letervesperon, do ege valoras leteroj, salutkartoj, korespondproponoj. Ni adreso: E-klubo „Starto", 121 355 Moskvo 355, a/ja 416, USSR.

Koran anticipan dankon!

la plenkunsido de la centra estraro de GDREA

La unuan fojon post la fondo de la Esperanto-Asocio ties estraro havis sian plenkunsidon la 25an de septembro 1981 en Jena. La 45-membra gvidantaro de la esperantistoj de GDR i. a. traktis la rezultojn de la IIIa Centra Konferenco (kp. „der esperantist" 108 kaj 109), pridiskutis kaj voĉdonis la laborplanon por 1981 kaj diskutis pri la agado de la distriktaj estraroj 1982. Por faciligi ties agadon, la centra estraro ellaboris ampleksan helpmaterialon, kiu listigas la ĉefajn taskojn kaj formojn por planado. Ankaŭ estis substrekata la neceso pli longperspektive planI la agadojn ĉe iom gravaj internaciaj arangoj eĉ, se eble, ĝis 1985. Nur longperspektiva planado ebligas trankvilan, akuratan kaj efikan agadon kun bona nivelo. La centra estraro krome aŭskultis diversajn raportojn, i. a. pri la jubilea arangO okaze de la 1300-jara ekzistado de la bulgara ŝtato en Šumen. Pri SAEST 1981 en Žilina, IMEK III en Ruse, pri la ILEI-Konferenco en Gödöllö k. a.

Konferenco en Baku

De la 18a ĝis la 21a de majo 1981 okazis en Baku (ĉefurbo de Azerbajĝano, Sovetunio) la 2a Internacia Renkontiĝo „Lingvo kaj Civito", por diskuti la temon „Dulingva edukado: Kultura identeco, kunlaboro kaj interkompreniĝo inter la popoloj".

Organizita de Tutmonda Federacio de Gemelaj Urboj kaj de Tutmonda Informo-Centro pri Dulingva Edukado (kies prezidanto estas la fama franca lingvisto André Martinet), la konferenco kunvenigis 250 homojn el 25 landoj de la tuta mondo kaj el 11 sovetaj respublikoj, plejparte lingvoinstruistojn, universitatajn profesorojn kaj magistratanojn.

Inter la 20 referantoj parolis prof. M. Isaev (prezidanto de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, kunlaboranto de la Soveta Scienca Akademio) kaj prof. F. A. Pennacchietti (Universitato de Torino, Italio). La unua raportis pri „La solvo de la naciaj lingvoproblemoj en multnacia socialisma ŝtato", la dua pri „Eksperimentoj pri lingvo-orientiga instruado en elementaj lernejoj pere de la Lingvo Internacia Esperanto". La oficialaj lingvoj estis la franca, la itala kaj la rusa. (Esperanto, 7—8, 1981)

Ĉio pri GDR

Ankaŭ tiel eblas titoli la ekspozicion „GDR konstruas socialismon", ekfunkciintan la 30an de septembro 1981 en la centra Samarkand-regiona biblioteko „A. S. Puschkin". La organizintoj — Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco kaj la regiona filio de Uzbeka Amikeca Asocio dediĉis ĝin al la 32jara datreveno de Germana Demokratia Respubliko.

Bele ornamitaj standoj de la ekspozicio, multnombraj plakatoj, fotoj, bildoj, libroj, revuoj, prospektoj, geografiaj mapoj kaj memorajoj rakontas pri historio kaj evoluo de la unua laborist-kamparana ŝtato sur la germana tero, pri la atingoj de GDR en ĉiuj sferoj de socia vivo, en ekonomio, scienco, tekniko, kulturo kaj arto. La materialoj de la ekspozicio elokvente atestas pri tio, ke la decida bazo de tiuj ĉi atingoj estas la frata unuiĝo de GDR kun USSR, skribcertigita per la kontrakto pri amikeco, kunlaboro kaj reciproka helpo. Pri la superaj forumoj de GDR-aj komunistoj rakontas la kompleto de plakatoj „La kongreso de SUPG (Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio"). La standO „La kontribuo de GDR en la pacbatalo" temas pri la paciniciatoj de socialismaj landoj, en kies realigo aktive partoprenis Germana Demokratia Respubliko. Fotokolekto „Berlin — ĉefurbo de GDR" estas dediĉita al la plej granda en la respubliko politika, ekonomia kaj kultura centro. Konsiderindan lokon en la ekspozicio okupas materialoj pri la multflanka kaj fruktodona agado de la Societo de germana-soveta amikeco kiu aktive kontribuas al la plifirmigo de frata amikeco kaj ĉiuflanka kunlaboro inter niaj landoj kaj popoloj. En la ekspozicio eksponatas ankaŭ standoj „Freundschaft — Druĵba", „Germanaj komunistoj ĉe la flanko de Soveta Unio", „GDR: ciferoj kaj faktoj", „Kulturo kaj arto en GDR", „Erich Weinert", „Esperanto en GDR" k. a. Samtage pri la ekspozicio informis radio, tiutemaj artikoloj (en la uzbeka kaj rusa lingvoj) aperis en gazetaro, oni publikigis grandformatajn afiŝojn kaj invitilojn.

En la okazigo de la ekspozicio grave helpis per tre multaj materialoj la Centra estraro de la Societo de germana-soveta amikeco, al kiu ni adresas niajn sincerajn dankojn. La abundo de materialo ebligis al ni arangi similajn ekspoziciojn pri la vivo de Germana Demokratia Respubliko en la vico de nia urbaj lernejoj kaj entreprenoj.

Anatolo Ionesov

Korekto

En „der esperantist" 108 (4/81), p. 85, ni informis pri Turisma Renkontiĝo 1982 en Schwarzenberg. Ni donis erare malĝustan adreson. Bv. noti la ĝustan: Hermann-Matern-Straße 2.

Jubilas la poeto Jiři Kořinek

La 1an de oktobro 1981 la konata ĉeha Esperanto-poeto Jiři Kořinek festis sian 75an naskiĝtagon. Li konatiĝis i. a. per la traduko de „Maminka“ (panjo) de Jaroslav Seifert kaj „Slezské písné“ (Sileziaj kantoj) de Petr Bezruč. Respektinda kvanto da poemoj de ĉeĥaj kaj slovakaj aŭtoroj atendas publikigon. La jubileulo gajnis 18 premiojn por originala kaj 3 premiojn por tradukita poezio, el tio 5-foje la unuan. Por la bezonoj de la tre viglaj kluboj en Brno kaj Usti nad Labem Jiři Kořinek tradukis centojn da oper-arioj, duetoj, korusoj kaj klasikaj kantoj, kiuj estis prezentitaj de profesiaj kantistoj dum solenaj vesperoj.
Al la gratuloj aliĝas ankaŭ Esperanto-Asocio de GDR.

IKURE, ISAB, SELAB . . . kiel la

Internaciaj Esperantistaj Ferioj ĉe Berlin

iam nomiĝos kaj atingos la plej bonan nivelon, la Distrikta Estraro de Berlin ankoraŭ ne kuraĝas promesi.

Sed jam nun, post la du tiaspecaj feriaj aranĝoj en 1980 kaj 1981, oni devas diri, ke nepre necesas, ankaŭ estonte havi internacian E-renkontejon proksime de nia ĉefurbo.

De la 30a de sept. ĝis la 11a de okt. ĉijare 6 bulgaroj, 3 ĉeĥoj, 3 hungaroj, 1 slovako kaj 14 civitantoj el nia lando, krome vizitantoj el Berlin, komune lernis, partoprenis ekskursojn, diskutadojn pri lingvoj, nacioj, problemoj de nia tempo . . ., festis kaj interbabilis. S-ro Tvarožek, la klera, bonkora seminarigvidanto el Slovakio, ĉiam troviĝis inter la partoprenantoj, senlace perante siajn lingvosciojn. Sed ne nur li kaj la prizorgantoj, ĉiu gasto mem helpis kontribuo al sukceso.

Tio eble estas la substrekenda ĉe similaj E-renkontiĝoj: Same sentas sin repondecaj gastigantoj kaj gastoj. Ĉiu esperas, revidi ĉiun iam ie.

M. L.

De la 13a — 25a de septembro 1982 denove okazos sur Interkampadejo Krossinlago

Internaciaj Esperantistaj Ferioj ĉe Berlin

(Nur por parolkapablaj esperantistoj)
Vi loĝos en kabanoj kun moderne ekipitaj 3-litaj ĉambroj.

La partoprenkotizoj (GDR-anoj 250,— M, ekserlandanoj 300,— M) kovros tranoktadon, seminarion, tagmanĝon, ekskursojn al kaj ĉirkaŭ Berlin.

Aliĝu ĉe Kulturbund der DDR, Esperanto-Verband, Bezirksvorstand Berlin, 1020 Berlin, Breite Straße 33/35. Poste vi ricevos precizajn informojn.

La nombro de la partoprenantoj estas limigata. Pri partopreno decidos la sinsekva alveno de la aliĝilo.

M. L.

Renkontiĝo Szczecin—Rostock

Dum la semajnfino 27./28. de junio 1981 okazis en Rostock renkontiĝo amikeca de esperantistoj el la ĝemelaj urboj Szczecin kaj Rostock. Partoprenis 17 geesperantistoj, 7 el Pollando. La celo de tiu ĉi amikeca renkontiĝo estis i. a. plenumi la taskojn de la jarlaborplano kaj interŝanĝi spertojn dum la nuntempa komplika internacia situacio. Krome oni priparolis la daŭrigon de la komunaj ĝemelurbaj rilatoj. Memkompreneble oni ankaŭ pritraktis la nuntempan situacion en Pollando kaj la minacon de la paco en Eŭropo kaj en la tuta mondo. La vetarmado de la Usona Reagan-administracio estas por tiuj homoj, precipe en Eŭropo, treege danĝera afero. Pro tio oni komune deklaris la kondamnon de la vetarmado kaj subtenon de ĉiuj pacemaj fortoj sur la tero. Krome oni subtenis la apelacion de la registaro de Sovetunio al ĉiuj parlamentoj kaj popoloj surteraj kontraŭ la vetarmado por konservi la pacon.

En amikeca rondo la partoprenantoj diskutis dum vespero multajn temojn objektive kaj én afereca atmosfero.

Dum venonta tago ili vizitis kulturhistoriajn konstruaĵojn de la malnova urbparto de Rostock.

Ce adiaŭo oni promesis ankaŭ estonte disvastigi la rilatojn sur ĝisnuna amikeca bazo, se ankaŭ ne ĉiam eblis atingi plenan konformecon pri kelkaj aktualaj problemoj. Finfine la prezidanto de la filio el Szczecin, J. Karvik invitis 2-personan delegacion el Rostock dum aŭtuno al Szczecin.

Laŭ Werner Plate, Rostock

KORESPONDDEZIROJ 31635

Venezuelo

Gestudentoj, komencantoj dez. kor.:

— Iris Betzaida Aranguren, Calle Ucrania No 41, Magalles Catia, **Caracas 1030,** pri sporto kaj dancado

— Gloria Beltran G., Calle 15 — Resid. „Ana Teresa" Piso 2, No 21, Calle 15 La Urbina — **Caracas 1070,** pri nağado k. promenado

— Carmen Clara Camero, Vereda 60, No. 11, **Coche Caracas 1040,** pri skoltismo k. plant-kultivo

— Maria Coramoto Camps, Av. Bellas Artes, Óta Caribay, Los Chaguaramos, **Caracas 1041,** pri ekskursoj

— Rubén Candia C., Autopista Prados del Este, Calle Valle Alto, Resid. Isla Verde, Piso 7, Apto 7-B, **Caracas 1080,** pri futbalo k. kino

— Meralis Castrillo M., Urb. Santa Inés, Av. Principal, Ota Yolissol, **Caracas 1080,** p. ĉ. t.

— Brigitte Clarac, Av. Mariscal Sucre, Edif. Zenit, Piso 4, No. 4-B, San Bernardino, **Caracas 1011,** pri muziko k. ekskursoj

— José Leonardo Chirinos, Av. Intercomunal del Valle, Resid. Don Pedro, Edif. „E", Piso 15, Apto 15-4, **Caracas 1090** pri sporto, pm

— Teresa Jesús Duque, Av. Baralt, Res. Baralia, Piso 4, Apto 4-B, Truco a Balconcito, **Caracas 1010,** pri kegloj k. dancado

— Mario H. Garcia C., Ota „Yanet", Calle 15, Urb. Atlantida, Catia La Mar, Dpto Vargas, **Caracas 1162,** pri futbalo k. atletismo

— Ildiko h., Gallo K., Calle La Joya, Edif. La Joya, Apto 16, Chacao, **Caracas 1060,** pri muziko k. promenado

— Eduardo José Flores, Av. Lazo Marti, Edif. Polux, Torre „A", Apto 1-C, Santa Mónica, **Caracas 1041 A,** pri filatelio k. pirogismo

— Eduardo Medina Morales, Conj. Resid. California Norte, Edif. 3, Piso 15, Apto 151, **Caracas 1070,** pri muziko

— Rafael E. Garcia, Calle 9, No. 9, Propatria, **Caracas 1030,** pri atletismo

— Paquita Martinez-Baruchi – Avda „A" Boleita, Resid. San Jorge, Piso 12, Apto „B", **Caracas 1070**, pri kolektado de kuleroj

— Alfredo C. Portillo, Ultramar Express, Av. Andrés Bello, Ed. Catleya, Esq. Av. Los Samanes, **Caracas 1050,** pri tabloteniso, sporto

— Auro A. Romero, Urb. Las Palmas, Av. Maracay, Ota „Aurimar" – **Caracas 1050,** pri leğoj k. muziko

— Maritza Y. Sánchez, Av. Lecuna, Res. Mundial, Piso 2, Apto 21, Redukto a Miraciclos, **Caracas 1010, pri** ĝardenistiko

— Roberto J. Sánchez M., Av. Intercomunal del Valle, No. 1, Piso 8, Apto 8-6, **Caracas 1090,** pri sporto

— Mery Sánchez, Biblioteca Mariano Picón Salas, Parque Aristides Rojas, Av. Andrés Bello, c/cPpal de Maripérez, **Caracas,** pri infanliteraturo

Soveta Unio

— Sveta Nikonova, **335 007 Sewastopol,** str. Narodnih Opolĉencev 15, 17j., dez. kor. pri historio, biologio, muziko, literaturo, kol. bk

— Studento, 20j., dez. kor. pri moderna muziko, radiotekniko, filozofio, kol. bk, pm: Sergeo Gerasevič, **333 024 Simferopol,** str. Imeni 60-letija Oktjabrja 17/65 ,loğ. 76

— Studentino, 20j., dez. kor. pri moderna muziko, dancoj, lingvoj, turismo, belarto, kol. bk pm: Irina Franŝtejn, **335 000 Sewastopol,** str. Lenina 64-18

— Juna geedza paro dez. kor. tutmonde: Aleksandro Fjodorov, 25j., pri lingvistiko, filozofio, historio, folkloro, instruado: Natali Fjodorova ,24j., pri kuirarto, edukado de infanoj, junularaj problemoj, belarto: **335 045 Sewastopol,** str. Jerošenko 14—34

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Esperanto-Verband
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. – Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. – Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 1090